



Turka Stelo

La revueto de la turka esperantistaro
Septembro 2019 n-ro: 45



Merhaba,

44. Eylöl 2019 sayımızdan bazı ilginç yazılar:

- * 104. UK'dan bazı sonuç yazıları.
- * "Mühürlenmiş Zaman" köşesinde "Dünyanın bir ucundaki fener" adlı filmin eleştirisi.
- * Yunan mitolojisinden Pygmalion ve Galatea'nın hikayesi.
- * MAS Edebiyat Sayfalarından Franz Kafka hikayeleri.
- * Arnavutluk'tan Adil Olluri serisinin son hikayesi.
- * Cezayir Kasbah'ına dair bir şiir.
- * ve daha bir çok haber, hikaye, şiir ve bunların yanında fıkra ve bulmaca köşesi.

Yukarıdaki resimde İstanbul yakınlarındaki Şile kasabasının deniz fenerini görüyorsunuz. Bu ayki Mühürlenmiş Zaman köşesine ilham olmuş tarihi bir yapı.

Hepinize iyi okumalar !

Saluton,


Jen kelkaj interesaj tekstoj el nia 44-a septembra 2019 numero:

- * Kelkaj tekstoj el la fino de la 104-a UK.
- * Recenzo pri la filmo "La lumturo en a fino de la mondo".
- * La rakonto de Pigmaliono kaj Galatea el la greka mitologio.
- * Rakontoj de Franco Kafka el la liteeraturaj paĝoj de MAS.
- * La lasta rakonto el la serio de Adil Olluri el Albanio.
- * Poemo pri la Kasbaho de Alĝero.
- * kaj multaj aliaj novaĵoj, rakontoj, poemoj ka angulo pri ŝercoj ka krucvortenigmo.

En la supra bildo vi povas vidi la lumturon de urbeto Şile proksime de Istanbul. Tiu lumturo fariĝis inspiro por la teksto en la angulo Tempo Sigelita.

Bonan legadon al ĉiuj !

SITE DE L'ASSOCIATION DES AMIS DU CDELI



TURKA STELO

Eldonanto : Turka esperantistaro

Redakcio : Vasil Kadifeli - vasilkadifeli (ĉe) gmail (punkto) com

Ĉeflingvo:

Esperanto (+turka)

Kodo:

Li-TUR-06

CDELI: Centro de Dokumentado kaj Esploro pri la Lingvo Internacia - Biblioteko de la Urbo La Chaux-de-Fonds

Enhavtabelo

Malfermo	1
Enhavtabelo	2
Kursoj	2
de Internacia Esperanto-Instituto	2
Esperanto Sumoo	3
UEA	3
TEJO	3
Leteroj de niaj legantoj	4
12 elstaraj agantoj premiitaj en Lahtio	4
Rezolucio de la 104-a UK de Esperanto	5
Premiitoj de la 70-a eldono de la Belartaj Konkursoj UEA	5
Rifuĝejo	6
Tempo Sigelita	7
PIGMALIONO kaj GALATEA (ΠΥΓΜΑΛΙΩΝ και ΓΑΛΑΤΕΙΑ)	8
La Aŭtunaj Muŝoj (parto 16)	11
Bildoj el la historio de la Esperanta Literaturo	12
Franco KAFKO (franz Kafka)	14
La fajrobrigadista ido	16
El la libro de "Dao de Jing" (36)	16
Sturno	17
Ĉe maro	17
Ŝercoj	18
Kurcvortenigmo	18
La malpliĝa fratino	19
Kanzono de somera trotuaro	20
Kial oni parolas?	20
La Kasbaho	21
Kiel mi perdis 5 jarojn el mia esperantista vivo?	22
Blogo de komputilvendisto	23
La malsama	24
Mia japana korespondanto	26
En la brikejo	27
Ni lernu Esperanton!	21
Facilaj rakontoj	32
Solvo de la krucvortenigmo	32

Kursoj



Finiĝis la kurso de Esperanto en la lernejo Ŭskŭdar Amerikan Lisesi en Istanbul. En somero ne okazos aliaj kursoj.

Murat Ŭzdizdar pensiĝis el Ŭskŭdar Amerikan Lisesi lernejo, do ekde venonta jaro la ŝanco daŭrigi EO klubon en ĉi tiu lernejo, bedaŭrinde, estos malalta.

de Internacia Esperanto-Instituto

Oni atentigas pri la grandega ĝeno, kiun suferas sciencistoj mondscale kaŭze de la lingva baro. El ĉiuj sciencaj esploradoj kaj studoj pli ol triono ne ricevas anglan tradukon, do fakte estas ne atingeblaj mondscale. Multegaj sciencistoj maltrafas do gravajn novajn ekkomprenojn kaj la nova scienca scio ne sufiĉe rapide atingas homojn, kiuj povas profiti de ĝi, ekzemple kuracistoj, psikologoj, ekologiistoj k.t.p.

ESPERANTO



Ni atendas leterojn el niaj geamikoj



Nia revueto atendas leterojn el niaj geamikoj!

Ni invitas ĉiujn geamikojn, ambaŭ turkoj kaj fremduloj, skribi kaj sendi al ni siajn opiniojn pri nia revueto, pri Esperanto kaj pri aliaj aferoj kiel memoroj, reĉenzoj de libroj jam legitaj, vojaĝoj, kongresoj, ŝercoj ktp. Ni aperigos ilin en nia revueto. Bonvolu aldoni vian nomon, aĝon, urbon kaj landon. Nia kontakt-adreso estas: vasilkadifeli@gmail.com

La redaktanto ne respondecas pri la subskribitaj aŭ republikigitaj artikoloj.

Esperanto-Sumoo



Dum la UK en Lahti mi respondecis pri kvar fakkunsidoj.

1. Esperanto-Sumoo :

En la lasta UK ni havis du kunsidojn de Sumoo, nome en dimanĉo kaj en vendredo. Dum tiuj 6 tagoj ni havis Sumoo-konkurson de Lisbono. Ankaŭ en tiu ĉi jaro ni havis la kunsidojn en la sama tagordo. En la unua kunsido de dimanĉo venis 15 homoj, tre malmulte kompare kun tiu en la lasta jaro. Tamen ni komencis la konkurson kaj ili ĉiuj aliĝis. La dua kunsido preskaŭ ne okazis, ĉar samtempe mi havis provludon de Internacia Arta Vespero. Mi disdonis diplomon de la sumoo al kelkaj homoj. kaj finis la duan kunsidon. En la venonta UK mi decidis ne plu okazigi Sumoo-kunsidojn.

2. Prezento pri Japanio kadre de Kleriga Lundo :

La 21an de julio (lunde) okazis Kleriga Lundo, en kiu prelegis diverskampaj homoj. S-ino Claude Nourmont, respondeculo pri tiu tago, volis, ke estu facilaj kunsidoj por komencantoj, kaj petis, ke mi havu du kunsidojn : pri Japanio kaj pri nekutimaj objektoj en la mondo. En la kunsido pri Japanio ĉirkaŭ 50 homoj venis, do la salono estis plenplena kaj preparitaj dokumentoj mankis. Mi prezentis 1. Ĵanken (maniero decidi vicajn), 2. Kanto („Sub la granda pomarbo”), 3. Kanto (“Rano kantas bele”), 4. Origami (Pafilo kaj trompa ŝipo), 5. Japanaj manĝaĵoj kaj fine ni havis bingon temantan pri Japanio. Ĉiuj partoprenantoj havis novan scion pri Japanio kaj ricevis premiojn, tial ili estis tre kontentaj.

>>13

UEA



N-ro 817 (2019-08-08)

105-a UK en Montrealo: multaj aliĝoj en Lahtio

La Montreala UK

sukcesis kapti atenton de la kongresanoj en Lahtio: ĉ. 90 homoj -- aŭ 10% de kongresanoj -- jam aliĝis por la venontjara kongreso en Kanado. La averaĝa kvanto de aliĝintoj jam en la antaŭa UK estas ĉ. 60, do por Montrealo aliĝis jam 50% pli ol averaĝe. [...]

N-ro 818 (2019-08-09)

Mesaĝo de Universala Esperanto-Asocio okaze de la Internacia Tago de la Indiĝenaj Popoloj de la Mondo

Universala Esperanto-Asocio salutas Unuiĝintajn Naciojn kaj Uneskon okaze de la Internacia Tago de la Indiĝenaj Popoloj de la Mondo, la 9-a de aŭgusto 2019. [...]

N-ro 819 (2019-08-24)

UEA engaĝiĝas por plurlingveco en scienca komunikado

UEA bonvenigas kaj subtenas la Helsinki-iniciaton por plurlingveco en la scienca komunikado, kiu pledas por lingva diverseco en gravaj terenoj de scienca agado: [...]

N-ro 820 (2019-08-25)

La unuan fojon Unesko uzos Esperanton en festivalo

La 19an de septembro 2020 (post unu jaro) Unesko okazigos festivalon por la paco en Tolosa (Hispanio). La laborlingvoj de tiu ĉi festivalo estas la franca, la angla, la hispana kaj Esperanto. [...]

TEJO



IJK 2019 en Slovakio, centoj da Esperantistoj en la koro de

Eŭropo

La IJK 2019 – 75-a Internacia Junulara Kongreso okazis en Slovakio, en la urbo Liptovský Hrádok, de la 28-a de julio ĝis 4-a de aŭgusto 2019.

La IJK 2019 estis semajno de amuziĝo, amikeco, muziko kaj lernado. 231 homoj el 35 landoj kunvenis en la koro de Eŭropo danke al Esperanto. Gratulojn al la organiza teamo por la mirinda laboro kaj dankon al ĉiuj partoprenintoj! [...]

La Estraro de TEJO 2019-2020

Dum IJK2019 en Slovakio estis elektita la nova Estraro de TEJO por la mandato 2019-2020. [...]

Programeroj elsendotaj dum IJK 2019

Ĉu vi bedaŭrinde ne povas veni kun ni ĉi-jare en Liptovský Hrádok sed vi ŝatus vidi programerojn kiuj okazos dum IJK?

Ni havas solvon por vi!

Dum la semajno, partojn de la IJK-programo oni vive elsendos! [...]

Nova numero de Revuo Kontakto

Jen la nova numero de Revuo Kontakto.

La abonantoj povas elŭti la elektronikan version de la revuo. [...]



Leteroj de niaj legantoj



Karaj,
En Turka Stelo mi tre aprezis la recenzon de la lasta novelaro de Julian Modest, "oni eniras mirindan mondon, riĉan je emocioj, espero kaj amoj. La aŭtoro spertas montri kaŝitajn sentojn, fortajn dezirojn, etajn ĝojojn", "Julian Modest estas ege sentema observanto kaj lia psikologia kompreno de la homaj sentoj kaj motivigoj estas trafa kaj profunda." Jes ja tio estas la takso kiun mi akiris jam pri li, leginte la novelaron, kiun mi havas de li: "Mistera Lumo". En ĝi legeblas rakontoj neforgeseblaj, kiel ekzemple "la argila kamelo" aŭ "novelo pri cigano, ursino kaj rondĉapelo".

Ankaŭ la tekston pri Marjorie Boulton mi tre aprezis. En la libro "Kontralte" de Marjorie Boulton, kiun mi ankaŭ havas, estas neforgeseblaj poemoj, kiel "politika manifesto", "la infanoj nenaskotaj" ktp.

Roland Platteau el Francio



Koran dankon pro la alsendo de tiu mirinda TURKA STELO!

Maria Nazare Laroça el Brazilo



Karaj hodiaŭ mi ricevis la aŭgustan numeron de "Turka Stelo". Koran dankon!
Kore mi dankas, ke vi aperigis la informon pri mia nova libro je centra loko de la revuo.

Por mi tio estas granda honoro.

Georgi Miňalkov el Bulgario



Dankon pro la revuo.
Tiu "Marhaba" egalas al nia "Merħba". La malta estas arabdevena lingvo.
Bondezire.

Carmel Mallia el Malto



Ho kara,
Ĉiam plezuron alportas min Turka Stelo.
Dankon elkore, via.

Bardhyl Selimi el Albanujo



Estimata. Mi gratulas vin pro la riĉenhava kaj interesa Turka Stelo. Mi deziras al vi fruktodonan estontan laboron sur la nobla kampo de E-kulturo! Estime vi salutas,

Hasan Hasan el Anglio

12 elstaraj agantoj premiitaj en Lahtio

-- el Gazetaraj Komunikoj de UEA



En la Solena Fermo de la 104-a Universala Kongreso en Lahtio estis anoncitaj la nomoj de 12 ricevantoj de Diplomo pri Elstara Agado kaj de Diplomo pri Elstara Arta Agado. Tiuj

diplomoj estas aljuĝataj de la Estraro de UEA ekde la jaro 2007.

Diplomo pri Elstara Agado:

Wolfram Diestel (Germanio) pro la elstara agado kiel fondinto kaj prizorganto de la Reta Vortaro (ReVo), kiu festas ĉi-jare sian 20-jariĝon.

Andrej Grigorjevskij (Rusio) pro la longdaŭra elstara agado kiel volontula prizorganto kaj retesto de la retejo de UEA.

Vasil Kadifeli (Turkio) pro la elstara agado kiel instruisto, tradukanto kaj redaktoro de la turka revuo Turka Stelo. Li estas unu el la motoroj de la Mezorianta kaj Nordafrika Komisiono de UEA (MONA), regule funkcia. Li aperigas proksimume unu komunikon semajne, jam de almenaŭ du jaroj. Li aperigas ankaŭ valorajn literaturajn verkojn el la araba kaj turka kulturoj.

Reza Kheir-khah (Tajvano) pro la longtempa elstara agado kiel instruisto de Esperanto por la tajvana movado kaj eldonisto de la revuo "Formoza Folio".

Małgosia Komarnicka (Pollando) pro la elstara agado kiel organizanto de kulturaj kaj klerigaj aranĝoj en Pollando, kiel la Interkultura Majrendevuo, la Eŭropa Festivalo de Esperantaj Kantoj.

Lu Wunsch-Rolshoven (Germanio) pro la elstara agado kiel informanto pri Esperanto. Li estas la fondinto kaj la estro de EsperantoLand kaj prizorgas la gazetarajn rilatojn de Germana Esperanto-Asocio.

Privas Tchikpe (Benino) pro la elstara agado kiel prezidanto de la asocio "Scio Sen Bariloj" kaj la provo mediicii en konfliktaj situacioj kaj kunlaborigi ĉiujn beninajn aktivulojn por Esperanto.

Bernhard Tuidler (Aŭstrio), bibliotekisto, pro la elstara agado kiel prizorganto de la Kolekto por Planlingvoj ĉe la Aŭstra Nacia Biblioteko kaj Esperanto-Muzeo en Vieno.

Wei Yubin (Jado) (Ĉinio) pro la elstara agado kiel direktoro de elementa lernejo kun 7 Esperanto-instruistoj. Li enkondukis Esperanton en sian lernejon antaŭ 10 jaroj; ĝis nun pli ol 600 lernantoj lernis Esperanton; ĉiujare oni okazigas Zamenhof-feston en la lernejo.

Diplomo pri Elstara Arta Agado:

Jo Haazen (Rusio) pro la senlaca agado arta kaj movada, inkluzive de la orkestra realigo de "La Espero".

Miroslav Malovec (Ĉeĥio) pro la elstara kontribuo al la muzika Esperanto-kulturo, per la traduko de la opero *Sternenhoch* (teksto de Ivan Acher laŭ la ekspresionisma romano de la ĉeĥa aŭtoro Vladislav Klíma), surscenigita de la Nacia Teatro en Prago.

Antonio de Salvo (Italio) pro la elstara kontribuo al la literatura Esperanto-kulturo. Li tre regule publikigas

sur retaj listoj informojn pri italaj verkistoj kaj pri famaj aŭ konindaj homoj. Li kreis kaj prizorgas ampleksan blogon en la bitoteko de Itala Esperanto-Federacio (www.bitoteko.it).

Fonto: <https://uea.org/gk/816a1>
N-ro 816 (2019-07-29)

Rezolucio de la 104-a UK de Esperanto



REZOLUCIO
de la 104-a Universala Kongreso
de Esperanto en Lahtio,
Finnlando

La 104-a Universala Kongreso de
Esperanto, kunveninte en Lahtio
de la 20-a ĝis la 27-a de julio

2019, kun 917 partoprenintoj el 57 landoj,

traktinte la kongresan temon "Vivanta naturo - floranta kulturo", en tri kongrestemaj sesioj, pluraj prelegoj, kaj diversaj aliaj kunvenoj kaj ekskursoj en la regiono de Lahtio;

notante la kongruecon de la temo kun la lastatempa nomumo de Lahtio kiel Verda Ĉefurbo de Eŭropo por 2021;

substrekante la ligitcon de la temo kun la Internacia Jaro de Indiĝenaj Lingvoj, proklamita de Unuiĝintaj Nacioj kaj Unesko por la jaro 2019;

deklaras, ke daŭripova naturo akompanas daŭripovan socion kaj daŭripova socio akompanas egalecan

-- el Gazetaraj Komunikoj de UEA

pritrakton de la homoj, ankaŭ rilate lingvon;

avertas, ke la nunaj procezoj de ekonomia tutmondiĝo egale minacas la daŭripovon de kultura diverseco kaj biologia diverseco;

substrekas, ke la Esperanto-movado, kiel movado por alispeca tutmondiĝo bazita sur respekto kaj valorigo de lingva kaj kultura diverseco, estas samtempe movado por daŭripova evoluigo en vasta senco;

atentigas, ke multaj individuoj kaj organizoj en la Esperanto-movado jam aktive laboras por pli ekvilibraj rilatoj inter naturo kaj kulturo, interalie agadoj por interkultura edukado, interhoma solidareco, kaj subteno al lokaj iniciatoj por daŭripova evoluigo; kaj

alvokas por interproksimiĝo kaj kunlaboro inter la Esperanto-movado kaj aliaj organizoj kaj movadoj por la protektado kaj evoluigo de lokaj kulturoj kaj naturmedioj en monda skalo.

Fonto: <https://uea.org/gk/814a1>
N-ro 814 (2019-07-26)

Premiitoj de la 70-a eldono de la Belartaj Konkursoj de UEA



Okazis ĉi-ĵaŭdon, la 25-an de julio, en Salono Lapenna kadre de la 104-a Universala Kongreso en Lahtio, Finnlando, la premisdono de la 70-aj Belartaj Konkursoj de UEA. Sub

gvidado de S-ro Miguel Fernández Martín kaj S-ro Miguel Gutiérrez Adúriz, respektive prezidanto kaj sekretario de la Komisiono pri Belartaj Konkursoj, ĉi-jara eldono rekordis pri la nombro de partoprenintaj literaturaj verkoj, kun entute 171 verkoj el la 5 kontinentoj: Oceanio, Afriko, Azio, Eŭropo kaj Ameriko.

La rezulto estas jena:

BRANĈO PROZO: partoprenis 31 verkoj de 22 aŭtoroj el 15 landoj (3 el Azio, 2 el Ameriko, 10 el

Eŭropo).

Juĝkomisiono: Giulio Cappa, Tim Westover, Trevor Steele.

Tria premio: en egaleco al la verkoj "Fanjo", de Ewa Grochowska el Francio, kaj "La plej granda tragedio", de Ariel Bonkorpa el Britio.

Dua premio: al la verko "Venko de tempo", de Christopher Lewis el Britio.

Unua premio: al la verko "La blua arbaro", de Jesper Lykke Jacobsen el Francio.

SUBBRANĈO MIKRONOVELO: partoprenis 49 verkoj de 30 aŭtoroj el 19 landoj (2 el Oceanio, 6 el Azio, 16 el Ameriko, 25 el Eŭropo).

Juĝkomisiono: Giulio Cappa, Tim Westover, Trevor Steele.

Unua premio, premio Paula Adúriz: al la verko "Verŝajne", de Christian Rivière el Francio.

La juĝkomisiono trovas menciindaj jenajn verkojn: "Ŝafoj", de Edmund Grimley el Britio, kaj "Teror-rakonto", de Paulo Sergio Viana el Brazilo.

Jen la premiita verko:

Verŝajne

Miaj gepatroj arigis en si ĉiujn homajn kvalitojn. Ili kvazaŭ simbioze kompletiĝis. Objektive, oni almenaŭ rekonu, ke la evidentan senzorgecon de mia patro kompensis la konata memfido kaj efektiva fidindo de mia patrino.

La someron antaŭ mia naskiĝjaro mia patro maltrafis la starton de alloga krozado, en kiu mia patrino estis pasaĝero. Kun sia valizo en mano kaj memproĉoj en la okuloj li korŝire konstatis, ke la ŝipo jam nereteneble foriras al la oceano.

Kiel konfirmis poste miaj du pliaĝaj gefratoj, se nia patro ne havus tiun fuŝan inklinon maltrafi jen ŝipon, jen nokto-trajnon, jen aviadilon, ni verŝajne estus naskitaj.

BRANĈO TEATRAĴO: partoprenis 4 verkoj de 4 aŭtoroj el 4 landoj.

Juĝkomisiono: Wera Blanke, Serĝo Sir', Giuliano Turone.

Tria premio: al la verko "Tutkorajn bondezirojn malŝlosajn", de Grupo de Esperantistoj de Francilio 2018-2019 el Francio.

La dua premio kaj la unua premio ne estis aljuĝitaj.

SUBBRANĈO MONOLOGO AŬ SKEĈO: partoprenis 6 verkoj de 4 aŭtoroj el 4 landoj.

Juĝkomisiono: Wera Blanke, Serĝo Sir', Giuliano Turone.

Unua premio, premio María Cuevas: al la verko "Maldikigi vortaregojn!", de Roman Dobrzyński el Pollando.

La juĝkomisiono trovas menciindaj jenajn verkojn: "Konfeso de murdunto", de Asocio Esperanto-Grenoble el Francio, kaj "La tuta mondo estas teatro", de Tatjana Auderskaja el Ukrainio.

BRANĈO ESEO: partoprenis 9 verkoj de 7 aŭtoroj el 7 landoj.

Juĝkomisiono: Gotoo Hitoshi, Antonio Valén, Giridhar Rao.

Dua premio: al la eseo "Stereotipaj komparoj en Esperanto", verkita de Suso Moinhos el Hispanio.

Unua premio, premio Luigi Minnaja: al la eseo

"Kodado en 'La kato en la sako', de Mason Stuttard", verkita ankaŭ de Suso Moinhos el Hispanio.

INFANLIBRO DE LA JARO: partoprenis 5 infanlibroj de 5 eldonejoj el 5 landoj.

Juĝkomisiono: Edmund Grimley Evans, Ricardo Albert Reyna, James Rezende Piton
La premio ne estis aljuĝita.

BRANĈO POEZIO: Partoprenis 67 verkoj de 35 aŭtoroj el 22 landoj (12 el Azio, 1 el Afriko, 17 el Ameriko, 34 el Eŭropo).

Juĝkomisiono: Krys Williams, Ĵak Le Puil, István Ertl.

Honoraj mencioj: al la poemoj "Knabo dum rifuĝado", de Yida Wei (Vejdo) el Ĉinio, kaj "Revoluciulo", de Tatjana Auderskaja el Ukrainio.

Tria premio: al la poemo "Tor fiŝkaptas", de Evgenij Georgiev el Kazaĥio.

Dua premio: al la poemo "Terra Incognita", de Evgenij Georgiev el Kazaĥio.

La unua premio ne estis aljuĝita.

Kunordigis la disdonon Fernando Maia Jr., Sara Spanó kaj Michela Lipari.

UEA gratulas la premiitojn kaj ĉiujn partoprenintojn kaj kore dankas la Komisionon pri Belartaj Konkursoj kaj la juĝantojn pro la giganta laboro. Ĝis la 71-a eldono!

Fonto: <https://uea.org/aktuale/komunikoj/2019/>

Premiitoj-de-la-70-a-eldono-de-la-Belartaj-Konkursoj-de-UEA

Rifuĝejo

de Maria Nazaré Laroca

Pilgrimantoj el la steloj,
ni alvenis en la mondon
por mallonga vivsezono
je la servado de Amo.



Tamen baldaŭ ni forgesas,
ke la reveno vidiĝas
sur l' agendo de l' Kreinto.

verkis **Maria Nazaré Laroca** el Brazilio

En la poezialiro
flora, dolora, ĥimera,
l'animo sin fortikigas
meze de gaja oazo
inter soleco el plumoj.

fonto: <http://nazarelaroca.blogspot.com/2019/07/refugio-rifugejo.html>

LA LUMTURO EN LA FINO DE LA MONDO (1971)

Sile, urbeto de Istanbul, mia naskiĝloko kaj mia patrolando, iam estis ĉarma sed nun ĝi estas popolamasa, kaj la naturo ĉirkaŭ ĝi estas parte detruita kaj plena je konkreto. Ĉi tiu urbeto, havas belan lumturon sur klifo en la bordo de Nigra Maro. Iam dum horoj mi naĝis en la maro sub tiu klifo kaj rigardis ĝin tra la akvo, kaj ĉiam pensis pri la filmo "La lumturo en la fino de la mondo". Precipe nokte mi ne povis deteni min rigardi la lumfaskon elirantan kaj etendiĝantan de ĝi. Ĝi donis al mi strangajn misteroplenajn sentojn. Dum noktoj turnante mian dorson al la lumturo kaj rigardante la klifojn, tiu sento koncentriĝis eĉ pli, kaj pensigis min pri la malkapableco de la homo kontraŭ la vasta maro kaj naturo.



Hodiaŭ, jarojn poste, spektante denove la filmon mi seniluziiĝis. La filmo, kiun produktis kaj ĉefrolis Kirk Douglas, ŝajnis al mi malsprita kaj enuiga. La rolantaro konsistas el la plej bonaj aktoroj de sia tempo: Yul Brynner, Samantha Eggar, Fernando Rey, Renato Salvatori... Kirk Douglas rolas sub la nomo Denton; la gardisto de la lumturo. Mi pensis, ke la romano de Verne eble estas pli bona, sed ankaŭ la romano eldonite post lia morto ne similas al la antaŭaj. Nek sciencfikcia nek fantazia... Kelkaj diras, ke ĝi estas aventura romano. Mi mem ne legis la romanon, sed kiel mi komprenas el la recenzoj la karaktero de la roluloj kaj ankaŭ la fikcio estis iomete ŝanĝitaj en la filmo. Do la romano devas esti ankaŭ enuiga!

Kapitano Kongre (Yul Brynner) kaj lia ŝipanaro, kiuj konkeris la insulon "Estados" (tiu nomo ne estas menciita en la filmo) kaj la lumturon, estas ŝajne aŭtomata maŝino de malbonaĵoj kaj teruraĵoj. Jes, ili konfuzigas la pasantajn ŝipojn per falsa lumo, la ŝipoj elvojiĝas kaj poste ili forrabas la ŝipojn. Tamen en la

filmo ankaŭ la rolo de la kapitano, kiu petas impostojn de la ŝipoj, estas malklara kaj malcerta. Dum la tuta filmo ni vidas bandon de sangosoifaj homoj same al vampiroj kaj al la terorista grupo ISIS en Sirio.



La kapitano havas iom misteran personecon. Li trovas foton, kiun Denton forfaligis eskapante de la piratoj. Sur la foto estas virino kun la nomo Emily Jane, al kiun Denton iam enamiĝis sed ŝi poste edziniĝis alian viron (la dua persono en la foto). La kapitano donis tiun nomon al Arabella, la nura savato de iu kaptita ŝipo. En la fino de la filmo ni malkovras ke ŝi fakte estis servantino, kiu uzis la falsan nomon "Arabella".


La scenaro ŝajnis al mi malfiksa. La roluloj ankaŭ ne havas profundecon, krom Denton.

La sola kvadrato, kiun mi tenis en la menso ekde mia infaneco estas tiu, kiam Kirk Douglas plonĝas en la maron kaj en ĝia profundo pensas pri sia pasinteco. Foje iu sceno enpikiĝas en via menso; kaj eble ĝi eĉ faras vin memori la filmon malĝuste. Mi ĉiam memoris, ke la filmo estis "bona". Tamen mi nun trovis ĝin meznivela kaj eĉ enuiga. Malgraŭ ĉiuj, tiuj splendaj dekoracioj, kostumoj, kaj la majstraj aktoroj...

Mi ne scias, ĉu Kirk Douglas, kiu nun aĝas 103, amas lumturojn same kiel mi, sed li faris, ke la lumturo enskrapigu en la imaga mondo de knabo. Mi tion bone scias...

Kune kun Yul Brynner, kiu ankaŭ estas rusdevena same al li, ili ambaŭ eniris la historion de monda kinejo. Brynner nun estas inter la sennombraj steloj en la universo. Douglas havas preskaŭ la aĝon de kino, sed li insistas resti en ĉi tiu mondo.

Ĉu steloj ankaŭ estas lumturoj en la ĉiela oceano?



verkis **Konuralp Sunal**

27 aŭgusto 2019, Büyükada, Turkujo

Laŭ tre malnova helena popoldiro “la amo povas ĉion, eĉ monton ĝi povas movi”, kaj mi, konstante fidela al la ideo, ke la amo estas por la homoj same necesa kiel la aero, tute kredas, ke la amo estas forto ĉiopova. Propran sperton mi ne havas, mia amo ofte skuis aŭ skuetis mian koron, sed monton ne movis; estas tamen tiom da historioj, kiuj atestas la veron de la popoldiro, historioj kiuj restas vivaj en la tuta senlima daŭro de la homa ekzistado. Kaj unu el la plej belaj tiaj historioj estas tiu de mia malnova kaj tre amata mita amiko, Pigmaliono.

Pigmaliono vivis en Cipro (Κύπρος) kaj eble havas apartan signifon tio, ĉar Cipro, la granda helena insulo, estas ne nur unu el la plej belaj lokoj de la mondo, sed ĝi estas benita de ĉiuj dioj, simple ĉar ĝi estas la naskiĝloko de la plej amata diino, de Afrodita (Αφροδίτη), la protektanto kaj fleganto de la belo kaj amo. Kaj ĉar la historio de Pigmaliono, kiun mi ĉi-malsupre rakontos, estas ne tre longa, mi kaptu la okazon iom paroli pri la naskiĝo de la amata Afrodita, ĉar ĉiuj vivuloj devas scii el kio venas la plej valora vivbonaĵo.



Pri tiu ĉi afero estas du precipaj versioj; laŭ la pli nova, probable mens-naskitaĵo de epikaj poetoj, Afrodita estas unu ankoraŭ filino de la reĝo de la dioj, Zeŭso (Ζεὺς), naskita de Diona (Διώνη), praa, pelasga diino, aparte kultita en Epiro (Ἠπειρος). Ŝajnas tamen, ke la vero, atestata de la nomo de la diino, estas jena: En la praaj, perditaj en la tempoforo, epokoj, kiam la plej grandaj fortoj de la naturo kruele interbatalis por gajni la super-regadon de la mondo, Krono (Κρόνος), tiama nova mastro, ribelinte kontraŭ sia tirana patro Urano (Οὐρανός), neatendite atakis lin kaj per falĉileto li detranĉis liajn seksorganojn, kiuj falis en la maron. La marondoj, kirle fortrenadis ilin longe, forminte densan ŝaŭmon, kiu atingis la marbordon de Cipro.

Kiam tio okazis, el la densa ŝaŭmo mirinde eliĝis la splenda, plej brila, plej bela, unika ina estaĵo, la granda diino de la amo. Tiele naskiĝis Afrodita kaj ĉar la vorto “ŝaŭmo” en la helena lingvo estas “αφρός” (afros) kaj “eliĝi” estas “δύομαι” (diome), estis donita al ŝi la nomo Afrodita, signifanta “eliĝinta el la ŝaŭmo”!



Revenante al tiu Pigmaliono mi diru ke li havis la sorton naskiĝi en la benita insulo de Afrodita. Li estis juna viro, bela, afabla, bone edukita (kelkaj skribas ke li estis reĝo, tamen tio ne interesas nin), tamen, laŭ la karaktero li estis iom fermita, modesta, trankvila, hezitema, tial li ne starigis facile amikajn aŭ aliajn rilatojn kun siaj samaĝuloj, najbaroj, samurbanoj. Konsekvence li ne havis am- aŭ amor-rilatojn kun virinoj, malgraŭ tio, ke multaj, eĉ belaj, junulinoj ofte montris al li intereson kaj favoron. Ĉio tio ĉi, tamen, ne signifas ke Pigmaliono estis viro nesentema, tute kontraŭe, en lia brusto batadis koro flamanta, li estis homo pasiplena, varm-sanga, fervora, sed ĉion tion ĉi li lasis libera nur en sia ateliero, kiam li tenis la skulptilon kaj la diversajn ĉizilojn, ĉar Pigmaliono estis skulptisto.

Li estis artisto alt-talenta, kiu estis kreinta multajn, laŭ la komuna opinio tre belajn verkojn. Oni diradis, ke ĉio kion Pigmaliono kreis, havis animon, ŝajnis reala, viva. Plej ordinare li skulptis statuojn aŭ reliefojn de homoj aŭ de bestoj, el diversaj materialoj kaj en diversaj grandoj kaj dimensioj. Tiel, malgraŭ tio, ke Pigmaliono ne estis societema persono, la homoj plejparte simpatiis lin, ĉar li sukcesis paroli al ili tre elokvente per siaj tre belaj skulptitaĵoj. Pigmaliono kutimis longe promeni, vagadi en la kamparo, en la urbo, en la haveno kaj atente, scivoleme observadi ĉion; tiele li inspiriĝis el la belaĵoj de la naturo kaj de la homa vivo. Li montris sin indiferenta por la virina ĉarmo, sed, kaŝe, tre atente li observadis la trajtojn, la tutan figuron kaj korp-formon, teniĝon, moviĝon, precipe de belaj junulinoj, kun kiuj li ne aŭdacis rilatiĝi, kaj poste, per siaj ĉiziloj li kreis belegajn reliefojn, statuojn kaj aliajn skulptaĵojn. Li priskulptis ĉian materialon, ŝtonon, lignon, marmoron, argilon, kaj ĉar li estis sufiĉe riĉa, li ĉiam rezervis bonajn kaj taŭgajn petrojn, pere de provizantoj, kiuj serĉis por li ĉion plej bonan.

Pigmaliono estis homo sufiĉe pia, li partoprenis la publikan kulton, li plenumis relative ofte siajn religiajn devojn, precipe honorante la grandan diinon, la patroninon de sia patrujo, Afroditan, en la ĉefaj

ceremonioj dediĉitaj al ŝi. Li adoris la diinon de la amo, li ŝatis la virinojn, kiel formojn, kiel figurojn, modelojn por lia arto, tamen, pri la eroto kaj amoro li sciis nenion.

La jaroj pasis kaj Pigmaliono estis jam plen-kreska viro, kiam li komencis senti ian melankolion, malviglecon, ian neeksplikeblan triston. Iom-post-iome li perdis sian fervoron kaj entuziasmon por sia laboro kaj dum multaj tagoj li restis senaga, ŝlosita en sia ateliero. En tia stato li estis kiam oni alportis al li grandan marmor-blokon. La transporto kaj la lokigo de la peza maso en la ateliero estis afero malfacila kaj longedaŭra, do, Pigmaliono estis tre laca kiam ĉio estis farita kaj li restis tute sola en la silento de sia laborejo. Kiel eble plej atente li longe ekzamenadis la materialon de sia venonta kreo kaj li estis tre kontenta, ĉar li posedis tre grandan, unupecan, masivan, senfendan marmoron, tre bon-kvalitan, puran, tute blankan.



Pensante pri siaj eblecoj, la bona artisto restis longe kontraŭrigarde al la petro, kaj tie, venkita de la laciĝo, li endormiĝis. Li falis en profundan dormon, dum kiu, sonĝe li vidis figuron de nuda, juna virino, eksterordinare, senmezure bela. Ĉiu detalo de ŝiaj trajtoj, de ŝia mieno, ĉia detalo de ĉiu ŝia korpoparto estis tute bone presita en la menso de la artisto, tiel, ke la bildo de la virino estis viva ankaŭ post lia vekigo. Pigmaliono vekigis kaj, tute strange, li estis forta, vigla, bonhumora. Mirakle, la melankorio, la malĝojo de la pasintaj tagoj, ĉio nea estis malaperinta, la artisto estis kreopreta kaj li bone sciis, ke lia nova

skulptaĵo estos virino en natura grandeco, estos la virino de lia sonĝo.

Li estis preta, tamen, kelkajn tagojn li ne tuŝis siajn skulptilojn, li staris, kvazaŭ kontaŭulo, fronte al la marmora maso, li febre rigardadis ĝin kaj per sia fantazio li lokis sur ĝi la bildon de la virino. La trian matenon Pigmaliono vekigis, en la sama loko, li sin turnis al la marmoro, kaj ŝajnis al li, ke ĝi estas diafana, ŝajnis al li, ke ĝi ne estas marmoro, sed io simila al glacio, unu glacimaso, en la interno de kiu estas enfermita, tute klare videbla, la belega virino de la sonĝo. Nur tiam Pigmaliono prenis la plej grandan skulptilon, la pezan martelon, kaj li komencis la malfacilan laboron. Li ne skulptis, li ne mezuris, li ne imagis, li nur hakis freneze la solidan, duran, rezistan al liaj batoj petron, li nur hakadis, disfalis en pecojn la ĉirkaŭon de la solido entenanta la virinon. Li ne skulptis, li ne kreis, li nur klopodis elliberigi la belulinon, estantan en la kerno de la diafana maso. La horoj pasis, la tagoj pasis, sed Pigmaliono ne ĉesis, li ne ripozis, ne dormis, ne manĝis, li daŭrigis sian bataladon kontraŭ la marmoro. Post kelkaj tagoj ŝajnis al li, ke la virino vokadis pri lia helpo, li opiniis ke li aŭdas ŝiajn kriojn, veojn, sian dolĉan vocon. La tagoj pasis kaj iam Pigmaliono lasis la pezan martelon, la grandan skulptilon, li prenis ĉizilojn pli kaj pli malgrandajn, ilojn pli kaj pli delikatajn, poste li skrapis per siaj ungoj, li frotis per siaj fingroj, fine li nur karesadis pli kaj pli milde, pli kaj pli tenere ĉiun punkton de la belega vizaĝo, de la perfekta korpo.

La statuo estis preta! Nun, fronte al la konsumita artisto staris la plej bela virino el tute blanka marmoro. Ĉio estis finita kaj Pigmaliono povis nur doni nomon al sia kreitaĵo. Pro ŝia blankeco, li nomis sian marmoran virinon Galatea, ĉar en la helena lingvo “γάλα” (gala) estas la lakto. Li povis fari nur tion, doni al la virino nomon kaj tuj poste li profundiĝis en longa dormo, havante kun si, en senfinaj dolĉaj sonĝoj, sian amatan Galatean.

Jes, vi ĉiuj, tre bone komprenis, Pigmaliono enamiĝis ja al Galatea. Por la unua fojo en sia vivo li sentis la plej ekscitantajn, nepriskribeblajn tiklojn de la amordeziro. En lia koro regis tempesto, lian korpon skuadis deziroj nekonataj, postulemaj, suferigaj, tiel ke, post nelonge, Pigmaliono perdis la kontakton kun la realo, li komencis vivi en mondo fiktiva. Li aĉetis la plej belajn virinajn vestojn kaj juvelojn, li vestis kaj ornamis sian senaniman amatinon, la tutan tagon li sidis apud ŝi, li parolis al ŝi, li rakontis al ŝi ĉion pri sia vivo, pri siaj pensoj, deziroj, revoj, malmult-vorte li akiris la amikindon, amatinon, amasantinon, kiun li neniam havis, ĉio en lia vivo estis ŝanĝita, ĉio estis nova!

Tamen, ankaŭ la falsa feliĉo de Pigmaliono ne daŭris longe; post kelka tempo ne sufiĉis al li la inerta esto de Galatea, li deziregis ŝian reagon, li bezonis reciprokan amon, amindumon, kuniĝon. Lia fantazio kuris freneze, ĝi plektis strangajn eblojn kaj Pigmaliono komencis opinii, ke per pli multaj kisoj, ke per pli multaj karesoj li iam povos doni vivon al sia amatino. Li suferis multe, li estis preta doni ĉion, eĉ sian vivon, por gajni nur unu rideton de la amata virino.



Li estis tre proksime al la frenezo, kiam kelkaj liaj parencoj, tre maltrankvilaj pro lia tre longa foresto de ĉio, preme devigis lin malfermi sian pordon. Hazarde, tiun tagon komenciĝis la granda, ĉiujara, tutlanda festo, plej granda civila solenaĵo, dediĉita al la granda diino Afrodita. Pigmaliono, ĉiujare partoprenis la feston kaj honoris la amatan diinon, do li obeis al la peto de liaj amikoj, li iris kun ili al la festo kaj tiun fojon li ne limiĝis al la ordinarajoj, li aĉetis belegan tute blankan kaprion, kies karnojn li farbis per vera oro, li ornamis ĝin dece kaj li mem sanktoferis ĝin sur la altaro de la diino. Poste, jam tre laca, li trovis dezertan, duonmalluman lokon en la granda sanktejo, li sidis tie kaj, kvazaŭ parolante al intima amiko, li komencis rakonti al la diino sian tutan solecan vivon, sian amon, sian unuan feliĉon kiu fine iĝis turmento, ĉion kion li spertis la lastan tempon. Plorante, la povra artisto parolis pri siaj neefikeblaj revoj, pri sia iluzio, li priskribis sian lastan, naivan esperon ke lia varma amo povos doni vivon al la marmoro. Li parolis longe

pri ĉio kaj iom-post-iome li sentis, ke tiu lia rakontado iom malpezigis lian koron, li ne plu sentis tiom peza la malfeliĉon kiu tiom longe suferigis lin.

Li revenis hejmen pli malpeza, pli bonhumora, li iris rekte al sia ateliero, li sidis sur sia seĝo, apude al sia senmova amatino kaj komencis rakonti al ŝi la okazaĵojn de la granda festo. Alkutimiĝinte aŭskulti nur sian vocon ne tuj komprenis ke iu parolis al li, ne tuj sentis ke io moviĝis apud li, ke io lin tuŝis. Jes, Pigmaliono bezonis tempon, nur kelkajn minutojn, tamen tempon, ŝajne tre longan, por koncepti, ke li ne estas sola, por konscii, ke miraklo okazis antaŭ liaj okuloj, ke la mirinda virino kiu brakumas, kiu soife, per lipoj flamantaj, kisas kaj rekisas lin estas Galatea, ke en lia brakumo estas lia unika amatino, vivanta, freŝa, belega, amorveka!

Jes, estis miraklo, Galatea viviĝis kaj estis nepriskribeble bela, ĉarma, plaĉa, alloga, linda, ĉia!

Estas certe, ke legante tiun ĉi historion, ĉiu el vi pensis, ke tiom arda amo ne devas esti senfrukta, ĉiu el vi deziris la miraklon. Afrodita, same kiel vi emociema, ne povus esti apatia, ŝi ne nur deziris, sed ŝi povis fari la miraklon. Jen, do, ŝi faris ĝin, kaj jen, la geamantoj, en la ateliero, tute vivaj, interbrakumite, en etoso de plena ĝojo, de feliĉo, de senbrida pasio ĝuas sian amon.

Oni permesu tamen al mi diri, ke min ne surprizis multe tiu mirindaĵo, ĉar mi scias, ke la amo estas ĉiopova, ke per, por, pro la amo ĉia miraklo estas ebla, oni memoru ke mi diris jam tion en la komenco de tiu ĉi mia rakontado!

Pigmaliono edziĝis kun Galatea, kun la plej bela kaj plej bona virino de Cipro. Li vivis kun ŝi longe, tute feliĉe, li lasis post si multon da belegaj skulptartaĵoj kaj kelkon da gefiloj, el kiu unu, la plej aĝa filo, nomita Pafo (Πάφος), estas la fondinto de la bela cipra urbo Pafoso, kie staras ankoraŭ ĝis nun restaĵoj de la tiea, fama templo de Afrodita.

Pigmaliono kaj Galatea ne iĝis steloj, tamen ili restas senmortaj, ĉar ilia historio inspiris multajn grandajn artistojn de ĉiuj epokoj. Estas belaj pentraĵoj, skulptaĵoj, romanoj, teatraĵoj, operoj, estas multa la belo kiu akompanas la memoron de la herooj de tiu ĉi rakontado!

verkis **Spiros Sarafian** el Grekujo
(elekto, aranĝo de bildoj, de Kostas Kiriakos)

LA AŬTUNAJ MUŜOJ (1931)

(daŭrigata)

"Li estas trankvila; por ĉiam li estas liberigita..."

Lulu zorge aranĝis siajn florojn, ekflamigis du kandelojn, kiujn ŝi metis ambaŭflanke de la kadro; tiam ĉiuj restis starantaj, senmovaj, provante pensi pri Jurij, sed ili nur sentis ian glacian tristecon, kvazaŭ longaj jaroj jam forfluis ekde lia morto. Nur du jaroj...

Per nekonscia gesto, Helena Vasiljevna dolĉe viŝis, kvazaŭ larmojn sur vizaĝo, la polvon, kiu kovris la vitron de l' kadro.

El ĉiuj ŝiaj infanoj, Jurij estis tiu, kiun ŝi malplej komprenis, malplej amis...

"Li estas kun Dio" ŝi pensis, "li estas pli feliĉa ol la aliaj..."

Aŭdiĝis la bruo de la festo en la strato.

"Varmas ĉi tie!" diris Lulu.

Helena Vasiljevna turnis la kapon.

"Nu, eliru, infanoj miaj... kion fari? ... Iru spiri la aeron kaj rigardi la feston. Kiam mi havis vian aĝon, mi preferis la foirojn de Moskvo ol tiun de Palmodimanĉo, ol la festojn de la Kortego..."

"Ankaŭ al mi plaĉas tio" diris Lulu.

"Nu, iru do!" rediris la patrino per laca voĉtono.

Lulu kaj Cirilo foriris.

Nikolao Aleksandroviĉ, starante antaŭ la fenestro, rigardis la blankajn murojn sen vidi ilin.

Helena Vasiljevna suspiris.

Kiom li ŝanĝiĝis!... Li ne estas razita... Li surhavas malnovan kaj tute makulitan jaketon... Kiel bela kaj ĉarma li estis antaŭe!...

Kio pri ŝi mem? ... Ŝi ŝtelrigardis sin en la spegulo, vidis sian palan vizaĝon, la malsanaspektan ŝvelaĵon de la karno, kaj la malnovan banmantelon el flanelo... "Maljunulino... maljunulino... Dio mia!"

"Njanjuška!" ŝi subite diris.

Neniam ŝi nomis ŝin tiel.

Tatjana Ivanovna, kiu silente vagadis de unu meblo al alia, laŭvice aranĝante kaj lasante la aferojn, ĵetis al ŝi strangan kaj konfuzitan rigardon.

"Barinja?"

"Ni maljuniĝis, ĉu ne, povrulina mia? Sed vi mem ne ŝanĝiĝas. Plezurigas rigardi vin... Vere, ne... vi ne ŝanĝiĝas!"

"Je mia aĝo, oni nur ŝanĝiĝos en la ĉerko" diris Tatjana Ivanovna kun pala rideto.

Helena Vasiljevna hezitis, demandis per mallaŭtiĝanta voĉo:

"Vi ja bone memoras pri nia domo, ĉu?"

La maljunulino subite ruĝiĝis kaj alte levis siajn tremantajn manojn.

"Ĉu mi memoras, Helena Vasiljevna?... Je Dio!... Mi povus diri, kie ĉiu aĝo troviĝis!... Mi povus eniri en la domon, kaj paŝi kun la okuloj fermitaj!... Mi memoras pri ĉiu robo, kiun vi surmetis, kaj pri la infanaj vestoj, pri la mebloj kaj la parko, Dio mia!..."

"Pri la spegulsalono, mia eta rozkolora salono..."

"Kaj pri la sofo, kie vi sidis dum la vintraj vesperoj, kiam oni kondukis la infanojn malsupren..."

"Kaj ankaŭ pri la tempo de nia geedziĝfesto?..."

"Mi ankoraŭ vidas la robon, kiun vi surhavis; viajn diamantojn en la haroj... La robo estis el muara silko, kun la malnova punto de la forpasinta Princino... Ha Dio!... Luliĉka ne havos ion saman..."

Ili ambaŭ silentis. Nikolao Aleksandroviĉ fikse rigardis la malluman korton; li memore revidis sian edzinon tian, kia ŝi aperis al li je la unua fojo en la balo, kiam ŝi ankoraŭ estis la grafino Letzkaja, kun sia robo el blanka sateno kaj siaj oraj haroj...

Kiom li amis ŝin!... Sed ili estas kune por fini sian vivon... Jam ne estas tro malbone!...

Se almenaŭ tiuj virinoj silentus... se ne ekzistus tiuj memoraĵoj en la fundo de l' koro, la ekzistado estus eltenebla...

Li pene diris tra siaj kunpremitaj dentoj, sen turni la kapon:

"Pro kio do? Al kio utilas? Ĉio finiĝis... Tio ne plu revenos. Ke aliuloj esperu, se ili deziras... Ĉio finiĝis, jes, finiĝis..." li rediris kun speco de kolero.

(daŭrigota)

tradukis MIKELO (Michel Dereyger), el Francio



Clelia Conterno-Guglielminetti (1915-1984)

"eta vivo ina sengraveca"

*La tagolumo forvelkadas lante,
oblikvas jam sur griziĝantaj paĝoj.*

Jam palas super ili la vizaĝoj.

Kaj horon gute sekvas hor' konstante.

Printemp' ekstere brilas diamante.

Estas ofte interese mediti nur pri kelkaj linioj de poemo sen unue legi la tutan poemon kaj tiel provi imagi ĝiajn cirkonstancojn. Ni rigardu ekzemple la suprajn liniojn el poemo de la poetino, kiun mi prezentas al vi hodiaŭ. Ni tuj konstatas en la unua linio la tempon: estas malfrue en la tago. La dua linio



indikas la lokon, probable bibliotekon kun malnovaj libroj, tion aludas la "griziĝantaj paĝoj". La vizaĝoj en la tria linio enkondukas personojn, evidente la legantojn, la ideo pri biblioteko estas fortigita, estas klare, ke temas pri kelkaj, eble multaj homoj sidantaj super malfermitaj libroj. Kiuj estas tiuj homoj? Ĉu junaj, maljunaj? La kvara linio konstatas malrapidan pasadon de la tempo, la horoj sekvas unu la alian kiel gutoj falantaj kun longaj intertempoj, tio esprimas senpaciencon atendadon, do probable temas pri junaj homoj. La lasta linio tion definitive pravas, la printempo ekstere allogas la junulojn, ili deziras forlasi siajn studojn por ĝui la eksteran liberon.

En bonaj poemoj ĉiu linio gravas, efektive ĉiu vorto gravas. En la supre cititaj linioj la vortoj forvelkadas, oblikvas, griziĝantaj, palas, gute, estas ĉiuj zorge elektitaj por krei sentebajn bildojn. Bone konstruitaj poemoj konsistas el tiaj unuoj: bildokreaĵoj vortoj kaj teme fidelaj versoj aŭ linioj, kiuj kune formas la tutaĵon, la poemon mem. Okazas foje, ke tiaj unuoj, formantaj parton de poemo, esprimas preskaŭ tutaĵon per si mem, kiel ekzemple la supraj linioj, kiuj formas la lastan parton de la poemo. La poemo mem havas la titolon Universitata biblioteko, kaj temas pri la kontrastoj inter enfermiteco kaj libereco, inter studoj kaj ludoj, inter devoj kaj deziroj. Jen la du antaŭaj partoj:

*Vizaĝoj junaj sur maljuna saĝo
de ŝimodoraj paĝoj de volumo
sin klinas en silenta duonlumo*

de l' salonego, krada scio-kaĝo.

*La bretoj polvas en obtuzo dorme,
severe gardas la kultur-sekretojn.*

*Singardaj voĉoj ŝpare flustras petojn;
sporadaj gestoj raras ombroforme.*

La supra poemo devenas el la komencaj jaroj de la poetino kiel instruisto en altlernejo, el la unua parto de la poemaro *Eta vivo* de Clelia Conterno-Guglielminetti. Pliaj poemoj el tiu tempo esprimas tiun kontraston inter la postulaj studoj kaj la ekstera libereco. Vi serĉas kun apliko / en la vortara diko / Trafoliumas vi / kaj la paperfoli' / resone klakas seke ... Kaj en la paradiza / sunlumo de l' ekstero / triumfas la somero, ŝi diras en la poemo *Lernantinoj*.

Clelia Conterno-Guglielminetti (1915-1984) estis itala, ŝi lernis Esperanton en 1934, tiam 19-jara. Ŝi studis beletristikon en universitato pri kiu ŝi poste doktoriĝis. Ŝi multe aktivis por Esperanto en sia hejmlando, redaktoris revuojn kaj okupis postenojn en la itala Esperanto-movado. Ŝi kunlaboris en multaj gazetoj kaj premiĝis en literaturaj konkursoj. Siajn fakajn sciojn ŝi utiligis i.a. je komentario kaj reviziado de la grandioza eldono de *La Dia Komedio* de Dante en traduko de Giovanni Peterlongo (1954 kaj 1980). Dum jaroj ŝi estis membro de la Akademio de Esperanto. En la itala lingvo ŝi verkis du poemarojn kaj unu romanon. En Esperanto ŝi verkis sian solan poemlibron en tiu lingvo kaj novelojn.

La poemaron *Eta vivo* (1969) oni povas rigardi kiel personan vivrakonton, kvankam ne temas pri biografia dokumento. La poetino esprimas siajn pensojn kaj sentojn per poemoj, kiuj respegulas ŝiajn sintenojn kaj reagojn al la okazaĵoj kaj eventoj, kiuj influis ŝian vivon, ĉiutagan kaj ja ofte tragikan. La tempo estis malkvieta, la milito kaj la postmilitaj jaroj multe pezis sur ŝia animo. En enkondukita poemo sen titolo ŝi rakontas pri nigra kajero, iaspeca taglibro; ŝi alparolas la kajeron: *Kajero nigra ... enfermas vi susurojn / pri eta vivo ina sengraveca ... Tiu ideo pri "eta vivo", estas multe ĉeesta en la poemoj de Clelia, intime ligita al ŝia konscio pri ŝia pozicio kiel virino, pozicio "sengraveca" en mondo de kruelo kaj stulto: ho nigra kajero / fariĝis mistero / danĝero / ĉar mute vi kriis / ke lupoj ĉeestas / ke bestas / la hom'al la homo. Oni povas kompreni el kelkaj poemoj, ke ŝin rekte trafis la milita kruelo, ke ŝia fianĉo estis arestita kaj forsendita en germanan koncentrejon. En poemo precize datita je la naŭa de septembro 1943 kaj lokita en la urbo Mantovo oni legas pri tiu terura okazaĵo kaj ŝia malespero:*

*La tutan tagon mi vin serĉis kure
en malespero, tra la urbo tuta,
la urb' horore fariĝinta muta;
mi trovis vin kaptita.
Trans la kradoj mi vidis vin: vi ŝajnis
Jesuo krucumita.*

La suferanta virino serĉas konsolon kaj esperon en sia religio, ŝi estas kristana kredanto; ŝi preĝas por lia reveno: Lin savu, Dio / je la nomo de ĉi dolora krio. Finiĝis la milito, kaj ŝi denove trovas sin en la preĝejo: Ĉe la altaro, forlasita kuŝas / mitralpafilo. En poemo titolita Reveno postmilita oni ja povas diveni, ke revenis ŝia amato, sed io grave ŝanĝiĝis: Domo nia, kial vi forpuŝas / kial, domo, vi ne volas nin? La domo ne estas la sama kiel antaŭe, ĝi estas senorda, kaduka, ĉu tio estas objektiva aŭ subjektiva impresio, oni ne povas scii. Tragikaj aferoj ja postlasas profundajn spurojn.

Oni povas provi tiel plulegi la vivrakonton de la virino. Ŝi sopiras havi infanon, kaj kortuŝas la leganton ŝia malespero en Infano mortnaskita:

*Li venis, pasis, nun dormas en humo;
celis forgliti preter atento,
kiel mortadas de l' tago la lumo,
kiel tintado sin perdas en vento.*

Sed same oni partoprenas ŝian feliĉon, kiam ŝia sopiro plenumiĝis; tiam ŝi verkas kantikon, laŭdan kaj dankan himnon al Dio: Laŭdata Vi estu, Sinjoro / pro dolĉa de mi kreitaĵo.

Sed la poemoj de Clelia ankaŭ havas aliajn temojn. Ŝi verkas pri naturaj scenoj, pri floroj, pri feliĉigaj momentoj je sunleviĝo kaj sunsubiro. En poemo pri vespero en boato ni vidas ŝin, patrinon, kun infano kaj patro: Kaj ni, triopa kuno / senvorte ni lulataj / en milda sorĉo de la lasta suno. Kaj ŝi ĝojas pri la skikurado de

sia juna filo:

*Triumfas vi sur neĝ-eterno alta ...
En sunkliniĝo paca
atendas vin mi laca ...*

*suriru vi por mi la montojn neĝajn,
forvenku vi por mi sovaĝon ventan ...*

La poemoj de Clelia Conterno-Guglielminetti estas grandparte senrimaj kun mallongaj linioj kaj en simpla, ordinara lingvo. Tio faras ŝiajn poemojn sufiĉe alireblaj por legado, kvankam ofte sentebblas aludoj al io nesolvita, io enigma, io trista, kio ne facile forlasas ŝian animon. En poemo pri ŝia dormanta filo ŝi diras: Vi estas tie ĉi, sed malproksimas / foras en tempoj de perfekta solo ... La tempo pasis, sed ankoraŭ taŭzas / min la mister' de via paca dormo.

Pri **Eta vivo**, la sola poemaro Esperanta de nia itala poetino, validas diri, ke kvalito tie valoras pli ol kvanto. Ĝi estas tratute persona, serioza homa dokumento pri unu virina vivo en tempoj minacantaj la aŭtentecon de la homa spirito. Ke la poetino trovis Esperanton aparte taŭga por esprimi siajn sentojn kaj pensojn dum tiuj malfacilaj jaroj, estas atesto pri la sanigaj povoj de la Esperanta vorto.

La poetino verkis ankaŭ du altkvalitajn novelojn en Esperanto: Vivo kaj morto de Wiederboren kaj Avinjo. Ili estas alireblaj en Trezoro: Esperanta novelarto (1989).

de **Baldur Ragnarsson**

Artikolo verkita por la revuo Juna Amiko, n-ro 119, 2007

Fonto: <http://esperanto.net/literaturo/tekstoj/ragnarsson/conterno.html>

3 >>

Sumoo

3. Prezento de nekutimaj objektoj : Lastan jaron en Lisbono s-ro Sylvain Lelarge kaj mi havis tiun kunsidon pri « nekutimaj objektoj » el la mondo. Ĝi sukcesis, do ni planis okazigi saman kunsidon en Lahti. Antaŭ la UK mi dissendis peton al miaj konatoj, ke ankaŭ ili kunportu tiajn aĵojn. Tial en la kunsido mi, Sylvain kaj partoprenantoj alterne montris tiajn aĵojn. 40 partoprenantoj kun intereso rigardis la prezentadojn.

4. Kundsido de « La Espero »: La himno estas nia valora trezoro, sed malmultaj homoj povas kanti ĝin parkere. Bedaŭrante tion, mi komencis havi tiun

kunsidon de 2011 en Hanojo. En la kunsido en Lahti partoprenis pli ol 40 homoj kaj ili kantadis la himnon por parkerigi ĝin. Fine ni havis ekzamenon kaj 4 homoj (du svedoj, japanoj kaj rusino) sukcesis kaj ricevis diplomon. Ĝis nun 182 homoj estas diplomitaj, el kiuj 40 estas japanoj.

Hori Jasuo

Franco KAFKO (Franz Kafka) *

Rakontoj

Infanoj sur la ŝoseo

Mi aŭdis la ĉarojn veturi preter la ĝardenkrado, kelkfoje mi ankaŭ vidis ilin tra la interspacoj apenaŭ moviĝantaj en la foliaro. Kiom krakis en la varmega somero la ligno en iliaj radoj kaj timonoj! Laboristoj venis de la kampoj kaj ridis tiom ke estis honto.

Mi sidis sur nia balancileto, mi ĝuste ripozis inter la arboj en la ĝardeno de miaj gepatroj.

Antaŭ la krado ne ĉesis. Infanoj kurpaŝe estis preter en momento; grenĉaroj kun viroj kaj virinoj sur la garboj kaj ĉirkaŭe malheligis la florbedojn; antaŭvespere mi vidis sinjoron promeni per bastono, kaj kelkaj knabinoj, kiuj venis renkonte al li, salutante paŝis en la flankan herbon.

Poste birdoj ekflugis kvazaŭ ŝpruce, mi sekvis ilin per la rigardo, vidis, kiel ili supriĝis kvazaŭ unuspire, ĝis kiam mi ne plu kredis, ke ili supriĝas, sed ke mi falas, kaj mi tenis min pro malforteco firme ĉe la kordoj kaj iomete ekbalanciĝis. Baldaŭ mi balanciĝis pli forte, kiam la aero jam blovis iom pli malvarmete kaj anstataŭ la birdoj aperis tremantaj steloj.

Ĉe kandellumo mi ricevis mian vespermanĝon. Ofte mi havis ambaŭ brakojn sur la lignotabulo kaj, jam dormema, mi mordis en mian buterpanon. La forte aĵuraj kurtenoj pufiĝis en la varma vento, kaj kelkfoje iu ekstere preterpasanta tenis ilin per siaj manoj, se li volis pli bone vidi min kaj paroli kun mi. Plej ofte la kandelo estingiĝis baldaŭ, en la malhela kandelfumo petolisu dum ioma tempo la kolektiĝintaj kuloj. Kiam iu demandis min de la fenestro, tiam mi rigardis lin kvazaŭ mi rigardus la montaron aŭ vidus en la nuran aeron, kaj ankaŭ li ne multe interesiĝis pri respondo.

Se tiam iu saltis trans la fenestrojlo kaj raportis, ke la aliaj jam estas antaŭ la domo, tiam mi tamen ĝemante leviĝis.

"Ne, kial vi tiom ĝemas? Kio do okazis? Ĉu estas aparta malfeliĉo, neniam rebonigebla? Ĉu ni neniam plu rebonfartiĝos? Ĉu vere ĉio estas perdita?"



Nenio estis perdita. Ni kuris antaŭ la domon. "Dank' al dio, jen fine vi!" - "Vi venas ja ĉiam tro malfrue!" - "Kial do mi?" - "Ĝuste vi, restu hejme, se vi ne volas veni kun ni." - "Ne kompatu!" - "Kio? Ne kompatu? Kiel vi parolas?"

Ni trapuŝis la vesperon per la kapo. Ne ekzistis taga kaj nokta tempo. Jen niaj jako-butonoj interfrotiĝis kiel dentoj, jen ni kuris en egala distanco, kun fajro en la buŝo, kiel bestoj en tropika lando. Kiel kirasuloj en praaj militoj, stamfante kaj alten en la aeron, ni pelis nin reciproke tra la mallonga strateto kaj per tiu elano en la kruroj, pluen sur la ŝoseo. Luj paŝis en la stratofoson, apenaŭ ili malaperis antaŭ la malhela krutaĵo, jen ili jam kvazaŭ fremduloj supre sur la kampovojo kaj rigardis desupre.

"Venu do desupre!" - "Venu vi unue supren!" - "Por ke vi repuŝu nin desupre, ni ne revas pri tio, ĝis tiom sufiĉas nia sprito." - "Vi volas diri: Tiom sufiĉas nia malkuraĝo. Nur venu, venu!" - "Ĉu vere? Ĉu vi? Ĝuste vi sukcesus nin repuŝi? Kiaj vi devus aspekti?"

Ni faris la atakon, ni estis puŝataj ĉe la brusto kaj kusiĝis en la herbon de la stratfoso, falante kaj libervole. Ĉio estis egale varmigita, ni sentis nek varmon nek malvarmon en la herboj, nur laciĝon.

Turnante sin sur la dekstran flankon, metante la manon sub la oreton, oni plej volonte endormiĝus. Oni ja volis ankoraŭ streĉiĝi por levi sin kun levita mentono, sed kompanse fali en pli profundan foson. Poste oni volis, kun la brako oblikve antaŭe kaj la kruroj oblikven blovitaj, sin ĵeti kontraŭ la aeron kaj certe fali en ankoraŭ pli profundan foson. Kaj tion oni volis neniam ĉesigi.

Kiel, en la lasta foso, oni ekstreme etendiĝus, precipe en la genuoj, pri tio oni ankoraŭ apenaŭ pensis, kaj kuŝis ploreme kvazaŭ malsana sur la dorso. Oni okulumis, kiam knabo foje, kun la kubutoj ĉe la koksoj, kun malhelaj plandoj transsaltis de la deklivo super nin sur la straton.

La lunon oni vidis jam en ioma alteco, poŝtĉaro preterveturis en ĝia lumo. Malforta vento leviĝis ĝenerale, ankaŭ en la foso oni sentis ĝin, kaj en la proksimeco la arbaro eksusuris. Tiam oni ne plu tiom emis esti sola.

"Kie vi estas?" - "Venu ĉi tien!" - "Ĉiuj kunvenu!" - "Kial vi kaŝas vin, lasu la stultaĵon!" - "Ĉu vi ne scias, ke la poŝto jam pasis?" - "Sed ne! Ĉu jam pasis?" - "Kompreneble, dum vi dormis, ĝi preterveturis." - "Ĉu mi dormis? Ĉu vere?" - "Silentu nur, tion oni ja vidas." - "Sed mi petas vin." - "Venu!"



Ni kuris pli dense, iuj reciproke etendis la manojn, la kapon oni ne povis teni sufiĉe alte, ĉar ni dekuris deklive. Iu elkriis indianan militkrion, en la gamboj ni ricevis galopon kiom neniam, ĉe la saltoj en la koksoj nin alten levis la vento. Nenio povintus nin haltigi; ni estis tiom kuraj, ke ni eĉ dum preterkuro krucis la brakojn kaj povis trankvile retrorigardi.

Sur la torentoponto ni haltis; la plukurintoj revenis. La akvo sube batiĝis ĉe ŝtonoj kaj radikoj, kvazaŭ ne estus jam malfrua vespero. Ne estis kialo por ke ne iu saltu sur la parapeton de la ponto.

Malantaŭ arbustoj malproksime elveturis vagonaro, ĉiuj kupeoj estis lumigitaj, la vitrofenestroj estis certe mallevitaj. Iu el inter ni ekkantis modkanton, sed ni ĉiuj volis kanti. Ni kantis multe pli rapide ol veturis la vagonaro, ni balancis la brakojn, ĉar la voĉo ne sufiĉis, ni venis kun niaj voĉoj en ian bonfartigan trudon. Miksante sian voĉon en la aliajn, oni estas kaptita kvazaŭ per fiŝhoko.

Tiel ni kantis, la arbaron endorse, en la orelojn de la malproksimaj vojaĝantoj. La plenkreskuloj en la vilaĝo ankoraŭ ne dormis, la patrinoj preparis la litojn por la nokto.

Jam estis tempo. Mi kisis tiun kiu staris apud mi, al la tri plej proksimaj mi nur iel etendis la manojn, komencis rekuri la vojon, neniu vokis min. Ĉe la unua kruciĝo, kie ili ne plu povis vidi min, mi flankeniĝis kaj laŭ kampvojoj rekuris en la arbaron. Mi alstrebis la urbon en la sudo, pri kiu oni diris en nia vilaĝo:

"Tie estas homoj! Imagu, ili ne dormas."

"Kaj kial ne?"

"Ĉar ili ne laciĝas."

"Kaj kial ne?"

"Ĉar ili estas stranguloj."

"Ĉu stranguloj ne laciĝas?"

"Kiel stranguloj laciĝu!"

Senmaskigo de fripono

Fine kontraŭ la 10-a horo vespere mi alvenis kun viro, kun kiu mi antaŭe konatiĝis nur preterpase kaj kiu tiun ĉi fojon estis ree aliĝinta al mi kaj min treninta du horojn tra la stratoj, alvenis antaŭ la moŝteca domo, en kiu mi estis invitita al societo.

"Do!" mi diris kaj klakis per la manoj kiel signo de nepra neceso adiaŭi. Malpli decidajn provojn mi jam farintis kelkajn. Mi estis jam tute laca.

"Ĉu vi supreniras tuj?" li demandis. En lia buŝo mi aŭdis bruon kvazaŭ interklakado de dentoj.

"Jes."

Mi estis ja invitita, tion mi dirintis al li tuj. Sed mi estis invitita iri supren, kie mi jam estus tre volonte, kaj

ne por stari ŝi tie malsupre antaŭ la pordego kaj rigardi preter la orelojn de mia vidalvidulo. Kaj por nun eĉ mutiĝi kun li, kvazaŭ ni estus decidintaj pri longa restado en tiu ĉi loko. Dume, la ĉirkaŭaj domoj tuj partoprenis tiun mutadon, kaj la mallumo super ili ĝis la steloj. Kaj la paŝoj de nevideblaj promenantoj, kies vojon oni ne emis diveni, la vento, kiu ĉiam denove premiĝis kontraŭ la vidalvida stratflanko, gramofono kantanta kontraŭ la fermitaj fenestroj de iu ĉambro, - ili aŭdiĝis el tiu mutado, kvazaŭ ĝi estus ilia proprajo de ĉiam kaj por ĉiam.

Kaj mia akompananto submetiĝis en sia kaj - post rideto - ankaŭ en mia nomo, etendis laŭlonge de la muro la dekstran brakon supren kaj apogis sian vizaĝon, la okulojn fermitaj, kontraŭ ĝi.

Sed tiun rideton mi ne plu vidis ĝisfine, ĉar la honto subite returnis min. Do, nur ĉe tiu rideto mi estis eksciinta, ke tiu estis neniu alia ol fripono. Kaj tamen mi estis jam dum monatoj en tiu ĉi urbo, kredis profunde koni tiujn friponojn, kiuj ĉenokte alpaŝas nin el flankstratoj, kun la manoj etenditaj antaŭen, kiel gastejestroj, kiuj ĉirkaŭvagas la aŝkolonon ĉe kiu ni staras, kvazaŭ ĉe kaŝludo kaj malantaŭ la rondaĵo spionas per almenaŭ unu okulo, kiuj ĉe stratkruciĝoj, kiam ni ektimetas, subite ŝvebas antaŭ ni sur trotuara eĝo! Mi komprenis ilin ja tre bone, ili estis ja miaj unuaj urbaj konatoj en la malgrandaj gastejoj, kaj mi dankis al ili la unuan vidon al necedemo, kiun mi nun tute ne plu povis pensi for de la tero, tiom ke mi jam eksentis ĝin en mi. Kiom ili ankoraŭ staris kontraŭ ni, eĉ se oni jam delonge estis eskapinta de ili, kiam do delonge ne plu ekzistis io por kapti! Kiom ili ne sidiĝis, kiom ili ne trenfalis, sed rigardis onin per rigardoj, kiuj ankoraŭ, eĉ se nur de malproksime, konvinkis! Kaj iliaj rimedoj estis ĉiam la samaj: Ili starigis sin antaŭ ni, tiom larĝe kiel ili povis; provis nin deteni de tie, kien ni celis; preparis al ni kompanse loĝejon en sia propra brusto, kaj se fine la tuta kolektiĝinta sentaro baŭmis en ni, ili prenis tion kiel brakumon, en kiun ili ĵetis sin, la vizaĝon antaŭen.

Kaj tiujn malnovajn ŝercojn mi estis tiun ĉi fojon ekkoninta nur post tiom longa kunesto. Mi disfrotis al mi la fingropintojn unu kontraŭ la alia, por malokazigi la hontaĵon.

Sed mia homo estis daŭre apogata ĉi tie, daŭre kredis sin fripono, kaj la kontento kun sia sorto ruĝigis lian liberan vangon.

"Rekonite!" mi diris kaj ankoraŭ frapetis lian ŝultron. Poste mi suprenhatis la ŝtuparon kaj la tiom senkaŭze fidelaj vizaĝoj de la servantaro supre en la vestiblo ĝojigis min kiel bela surprizo. Mi rigardis ilin ĉiujn laŭvice, dum oni deprenis de mi la mantelon kaj senpolvigis miajn botojn. Senŝarĝite kaj alten streĉita

mi poste eniris la salonon.

elgermanigis **Vilhelmo LUTERMANO** el Kubo
*** publikigita kun permeso de la tradukanto ***

Fonto: <http://vlutermano.free.fr/kafka.html>


* **Franz KAFKA** naskiĝis la 3-an de julio 1883 en Prago, mortis la 3-an de junio 1924 en Kierling [Kirling] (Aŭstrio) estis aŭstra germanlingva verkisto de noveloj kaj mallongaj rakontoj.

La fajrobrigadista ido

-- amuze rakontas **Maurizio Brucco** el Hispanio

Antaŭ ne longe, mi trovis etan forlasitan fajrobrigadistan idon survoje. Li estis preskaŭ frostiĝinta pro la vintra neĝo, kaj tiel sendefenda, ke mia koro rompiĝis en du pecojn, do mi decidis adopti lin. Ekde tiam, granda amikeco naskiĝis. Li sekvas min ĉien, ofte li ripozas sur miaj genuoj, ronronante dum mi karesas lin, li amas skrapi siajn ungojn kontraŭ la sofo, kaj tenas la musojn for de mia hejmo. Sed hodiaŭ, li grimpis sur arbon, kaj..ne plu kapablis subeniri ! Kia kompatindulo! Kion fari? Senhezite mi alvokis la katojn, kiuj pacience savis lin post longaj klopodoj kaj.. kelkaj ungoskrapaĵoj sur siaj brakoj. Ke Dio benu ilin!

sendis **Maurizio Brucco** el Hispanio



El la libro de "Dao De Jing" verkita de ĉina filozofo Laocio, fondinto de Taoismo (36)

DUA PARTO - LA VIVO

61



Per tio, ke granda regno orientiĝas kiel torento malsupren, ĝi fariĝas la unuiĝo de l' mondo. Ĝi estas la ineca de l' mondo. La ineca venkas ĉiam la virecan pro ties kvieto. Pro ties kvieto ineca tenas sin malsupre. Se la granda regno tiel submetas sin al la malgranda, ĝi gajnas per tio la malgrandan regnon. Se la malgranda submetas sin al la granda, ĝi gajnas per tio la grandan. Tiel unu el la regnoj per tio, ke ĝi submetas, gajnas, kaj la alia per tio, ke ĝi submetas sin, gajnas. La granda regno celas nenion alian krom unuiĝi kaj nutri la homojn. La malgranda regno celas nenion krom partopreni je la priservado de la homoj. Tiel atingas ĉiu regno tion, kion ĝi celas; sed la granda devas resti sube.

Rimarkoj de Anniespera:

Vilhelmo:

„Ĝi estas la ineca de l' mondo“

Laŭ la originalo:

„Ĝi estas kiel la ineca de l' mondo.

Vilhelmo:

„Per tio, ke granda regno orientiĝas kiel torento malsupren, ĝi fariĝas la unuiĝo de l' mondo.“

En la originalo la vorto „jiao“(fonetike) ne signifas „unuiĝo“, sed „konverĝo.“

Pri tiuj ĉi superaj frazoj, laŭ mi, la traduko de Wang Chongfang estas pli preciza:

„La granda regno devas esti kvazaŭ ĉe la malsupra baseno de rivero, al kiu fluas iuj riveretoj; ĝi devas esti tia loko, al kiu konver as io sub la ĉielo,“

Vilhelmo:

„Tiel unu el la regnoj per tio, ke ĝi submetas, estas gajnata, kaj la alia per tio, ke ĝi submetas sin, gajnas. Laŭ mi, la originalo diras, ke tiu, kiu sin submetas, gajnos.

Vd. el Wang Chongfang:

„Jen kial granda regno, metante sin sub malgrandajn regnoj, igas la malgrandajn apogi sin sur ĝi. Malgrandaj regnoj povas, metante sin sub grandan regnon, akiri ties

fidon.“

Rimarkoj de Cezar

Kiel funkcias komuneco? Jen konata demando. Ĉu per tio, ke ĉiuj estas samaj, kiel oni ofte spontane supozas, aŭ per diplomata kunagado, do per reciproke avantaĝa kunlaboro, kiu eĉ kapablas glatigi klasdiferencojn dum certa tempo? Nu, la lasta vojo certe estas pli sukcespromesa en mondo, kiu ankoraŭ tute ne estas egala. Grandaj regnoj ĝuste tiom longe ekzistis, ĉar la grandaj regnoj siajn diversajn popolojn ne nur subigis, sed efektive civilizis, do kunigis kaj unuecigis. La plej sukcesa regno tiurilate certe estis Ĉinio, sed ankaŭ la romanianoj estis tre sukcesaj, ĉar

la imperiestroj kaj oficistoj de tiuj imperioj sciis, ke oni ne nur povas postuli tributojn de la subigitaj popoloj, sed ke oni samtempe devas eduki kaj gardi ilin. Do kulture kaj ekonomie enplekti ilin en la grandan imperion. Prudenta politiko estas antaŭ ĉio eterna ekvilibro de diversaj fortoj. Laocio ne estis homo, kiu estis preta fiere kuri kun antaŭŝovita kapo tra dika muro. Li agis pli saĝe, laŭ la devizo, ke ŝtonaj monumentoj kaj tutaj regnoj venkeblas ankaŭ kvazaŭ per mola akvo, per tio, ke oni tiom longe cirkaŭfluas ilin, ĝis ili iam kvazaŭ per si mem kunrompiĝos.

(daŭrigota)

Sturno

fablo de Ivan Andrejevich Krilov (1769-1844) Rusio

Por ĉiu hom' ekzistas la talent'.
Sed ofte volas homo kun pretend'
Aferon iun fari nur,
Al kiu mankas eĉ kapablo.
Ne spitu vi al leĝo de natur':
Laboros vi sukcese, kun agrablo,
Nur agu sen pretend', laŭ via propra fort'.
Jen iu Sturn' imitis en akord'
Al kanto de kardel' tre bone, kun fidelo,
Ja kvazaŭ mem li estus la kardelo.
Per sia gaja voĉ' li kantis en arbar'
Kaj ĉiu laŭdis lin pro tiu kanta far'.
Sed ne limigis sin la Sturno en talento, —
La fam' pri najtingal' atingis jam al li,
Turmentas Sturnon nun envia sento.
Li pensas: „Kantos mi
En bela melodi',
Laŭ najtingala sono.”
Kaj fakte pro envi'
Li kantas en arbar' laŭ nova kant-fasono.
Jen pepas li, jen estas raŭka kri',
Jen blekas kiel hund' maisata,

Jen en subit'
Miaŭas kvazaŭ kato.
Disflugis birdoj for pro tiu kant-ekscit'.
Amiko mia Sturn', plibonas laŭ merit'
Kardela simpla kant' en tono delikata,
Ol kant' de najtingal' en bleka fush-imit'.

verkis **Ivan Andrejevich Krilov** (1769-1844) Rusio
tradukis **Sergej Grigorjeviĉ Rublov** (1901-1979)
Ukrainio



Ĉe maro

poemo de Klara Ilutoviĉ el Rusio

Maro similas helbluan kristalon,
Ondoj ĉe sun' pace ludas.
Katoj atendas abundan regalon:
Eĉ du boatoj apudas!

Vivas kortuŝe l' fotita konkordo
En la naturo sunplena.


Perdas jam la paciencon la katoj:
Kiam do fiŝoj aperos?!
Iu albordiĝis fiŝplenaj boatoj!
Tamen la katoj toleros.

verkis **Klara Ilutoviĉ** el Rusio
foto de Lenke Szász

Maro, ĉielo kaj katoj sur bordo
Antaŭ ĝuado l' festena –



Ŝercoj



Maljunulino ŝtelis ladskaton da persiko en vendejo. La gardisto rimarkis la aferon kaj kondukis ŝin al la poliestro.

--- Kion vi ŝtelis, sinjorino ? demandis la poliestro.

--- Mi ŝtelis ladskaton da persiko.

--- Kiom da persiko estis en la ladskato ?

--- Nur ses.

--- Do vi restos mallibera dum ses tagojn.

Subite, ŝia edzo stariĝis kaj tre rapide diris:

--- Sinjoro poliestro, ŝi ŝtelis ankaŭ ladskaton da pizo.

Tradukis el la portugala lingvo:
Gilberto Menegasso

Du amikinoj parolas.

- Vi daŭre serĉas novan viron, sed vi ne disiĝis kun la antaŭa?

- Kiam vi iras al la vendejo por novaj ŝuoj, ĉu vi iras tien senŝua?

Ĉe la lito de mortanta edzo

- Karulino, mi devas ion konfesi al vi! Mi dormis kun via patrino, kun via fratino kaj kun via plej bona amikino.

- Mi scias, karulo. Sed nun restu trankvile por ke la veneno povu bone efiki!




Ĉu vi volas esti atestanto de Jehovo

Mi bedaŭras sed mi ne vidis la survojan akcidenton

Krucvortenigmo

-- el Semajno de Enigmoj




HORIZONTALAJ DIFINOJ (→)

1. ___ Kristnaskon kaj Feliĉan Novan Jaron; 6. La mondo estas ___ el Dio; 7. Landokodo de Maroko; 8. La ___ lingvo estas parolata en Etiopujo, Kenjo kaj Somalujo; 10. Elektre ŝargita formo de molekulo (akuzativo).

VERTIKALAJ DIFINOJ (↓)

1. Sonoj de ĝemanto; 2. Genro de dekpiedaj krustacoj; 3. Ĝojan Kristnaskon kaj Feliĉan Novan ___ ; 4. Sufikso kiu signas ke objekto estas "membro de grupo"; 5. Ĝojan Kristnaskon kaj Feliĉan ___ Jaron; 9. Simbolo por molibdeno je kemio.



HORIZONTALAJ DIFINOJ (→)

1. Grandaj ujoj por konservi furaĝon, grenon; 6. Kutima aŭ daŭra uzo; 7. Vazon, ujon, marmiton; 8. Elveni, elmoviĝi; 10. Kemia elemento kiu havas la simbolon Re.

VERTIKALAJ DIFINOJ (↓)

1. Kontraŭo de sub; 2. Aparte; 3. Brazilo estas lando de ___-Amerika; 4. Balzami, parfumi; 5. Azia bordo de la Egea Maro.

Fonto: Semajno de Enigmoj #4

<http://www.semajnodeenigmoj.com>

(La solvo de la krucvortenigmo troviĝas en la antaŭlasta paĝo)

Rakonto de Adil Olluri, el Albanujo



Ŝajnis tio ŝin nekredebla, pensis ke ŝi estis en anksia sonĝo kaj ne en duetaĝa domo, kiam vidis la tranĉilojn en iliaj manoj. Oni murdis ŝin senkompate, en maniero kion neniamfoje ŝi povus antaŭpensi. Nek ŝi imagus iamfoje tian morton.

Murdis ŝin la manoj de homoj, de kiuj plej malmulte ekspektus la vivofinon. Unue, ili alfiksis la tranĉilon dufoje sur la maldekstran flankon de la brusto, tutapude al la koro, poste, por esti pli certaj pri ŝia morto, per la sama akra porvianda tranĉilo, kiu ne estis tiel granda, sed tro profunde eniginta, ili disŝiris la ties gorĝan trakeon. La sango elverŝiĝis el la brusto, gorĝo kaj buŝo, kvazaŭ rivero, kvazaŭ senkulpa ŝafido, buĉita en la sola buĉejo de nia malgranda urbo.

Ili estis aranĝinta la aferon por bone kaŝi la tuton, enigante la kadavron en fosaĵon, malpli ol unu metron profundan, kovritan per lignoj, kverkaĵoj kaj monta arbustaĵo. Ili klopodis kaŝi ĉiujn spurojn de ilia akto, por ke neniu kaj neniam eksciuj pri tiu afero.

Je kaŝtankoloraj okuloj, Ardita, dum kvar jaroj sinsekve estis la amatino de la altstatura Avni, kiun ŝi amis kaj estis enmanigita tutanime. Ne malĉeestis ankaŭ lia amo por la knabino, kun kiu li deziris travivi ĉiujn belaĵojn ofertataj de la vivo. Estis li tipo al kiu plaĉis la vojaĝoj al diversaj landoj. Li kontentiĝis entreprenante oftajn vojaĝojn kun la amatino de sia animo, preskaŭ al ĉiuj urboj, urbetoj, kasteloj kaj malnovaj preĝejoj, samkiel al vilaĝanguloj de nia lando, igantaj lin scivolema, jen pro la legaĵoj, jen pro konversacioj kun amikoj kiuj estis vidintaj pli frue tiujn lokojn.

Ŝi, distinge de sia amato, estis pli diversa, Ne plaĉis al ŝi tiom la vojaĝoj, preskaŭ ĉiutagaj, kiuj ŝajnis ŝin envanaj, sed, ĉar ŝi amis lin multe, ne rifuzis kaj postsekvis lin ien ajn. Ŝi deziris pli kvietan kaj pli familian vivon. Ŝi petis lin, tri sinsekvajn jarojn, ke ili fianciĝu, sed li ĉiam starigis variajn pravigaĵojn.

Ŝia fratino, Luljeta, du jaroj pli aĝa, estis edzinigita al Afrim, kun kiu estis konatiĝinta dum la studoj, sed, ekde nun li estis nigrigante ŝian vivon. Komence, li amis ŝin, sed pli poste ĉio iris maloportune en ilia vivo, kio nur surface povus konsideriĝi komuna. Ŝia edzo, kiu, tri jarojn antaŭe, transpasis la tridekjarojn, malfacile portis cent tridek kilogramojn en lia korpo. La

superpezo kiu ne konvenis al junulo, estis paliginta la iaman lian masklan ĉarmon, al kio estis ŝi enamiĝinta. Li, lastatempe ekkutimis vagadi la tutan nokton tra la urbaj kafejoj kaj reveni hejmen ebriigita. Ofte li elbatis la edzinon, ne tolerante ŝiajn pikantajn vortojn pri liaj vagadoj.

Ĉio estis malsuprenirante en ilia geedziĝo, aparte post la tago kiam li vidis sian edzinon intersalutante surstrate kun masklo, kiun li konis kaj sciis ke ankaŭ li iam amis Luljeta-n. Envane ŝi klopodis por konvinki lin ke ŝi haltis kaj ridis ne malbonintence, sed li tute ne konvinkiĝis. . Simple, li supozis ke la edzino perfidas lin.

Malgraŭ la duboj kaj supozoj, li neniam intencis divorciĝi de ŝi. Li amis ŝin kiel la unuan tagon.

Ardita, tute neatendite, en ordinara tago, disiĝis de ŝia amato. ĉar eksciis ke li komencis akompani belan brunulinon, al kiu neniu masklo povus rezisti, pensante naturece. Tion estis dirinta ŝin mem Avni per propra buŝo, demandante nur iom da tempo por plene disiĝi de la novamatino de siaj sentoj. Sed, ŝi, kiu serĉadis, dum kvar jaroj sinsekve, lokon en tiuj sentoj tute ne atendis. Estis rezigninta imediate. Ŝi estis sentinta subigita dum tutaj tagoj kaj semajnoj. Senĉese ŝi pensis veplore pri la perdita tempo, kion oni ne povas plu revenigi.

Avni, iutage, renkontiĝis tute hazarde kun Luljeta, la pliaĝan fratinnon de la iama lia amatino. Kaj, ekde tiu momenteto, kiam iliaj okuloj renkontis la marmoran placon de nia granda urbo, ili komencis akompanati. Tuj post du semajnoj iliaj renkontiĝoj ne plu estis nur amikaj. Ili akiris formon transpasinta la limojn de la kunfrontiĝoj inter du korpoj, kiuj iam agnoskiĝis kiel pretendanta novedzo kaj estonta bofratino.

Ardita estis eksciinta tion, tuj post la fatala novaĵo ricevita de iu sia infanaĝa amikino. Ŝi konfuziĝis. Ne sciis kion fari. Ŝi ne atendis tion. Almenaŭ ne kun la fratino. Almenaŭ ne de fratino. La sento de duobla perfido, la sento de kolero, ĵaluzo kaj malamo estis freneziginta ŝin ĝis tiu grado, kiom ŝi volis ne alian, krom la venĝemo.

Ŝi estis ofendinta, kiel neniam antaŭe, la pliaĝan fratinnon kaj estis minacinta ke ŝi farus plejeblon por ke tiu afero fariĝu konata de ŝia edzo.

La novaj geamantoj embarasiĝis. Luljeta nun sin

gardis ne nur de sia edzo, sed ankaŭ de sia malpliaga fratino. Ŝi aldiris al sia stalono, ke, se tion ekscius sia dikulaĉo, li ne nur mortigus ŝin, sed ankaŭ al li mem certe eksplodigus la cerbon.

Ili devus trovi solvon.

Luljeta, dum iu antaŭtagmezo, kiam sia edzo laboris, estis invitinta sian malpliagan fratinton en sia

hejmo, ĵurante ke jam ĉio estis finiĝinta kaj ŝi neniam plu vidus Avni-n, troviĝinta tie dum la tempo kiam ŝi estis telefonante.

tradukis **Bardhyl Selimi**, el Albanujo

Kanzono de somera trotuaro

-- poemo de Robert Desnos *

*Ni kuŝiĝu sur ŝoseo,
Dum sunada varmo, sub la suno feo,
Dum ĉi bona polvodoro elleviĝos
De la tago maldeĵora,
Antaŭ l'nokto malaŭrora,
Antaŭ ol l'unua lampo eklumiĝos .
En stratdefluejo ni spegule gvatos
Kiel nuboj blankaj vatos,
Kiel pompe sango fluos horizonte,
Ĝis la unua stelo supertegmente.*



poemo de
Robert Desnos
el Francio

esperantigis kaj sendis
Roland Platteau el Francio
1/6/2018



* **Robert Desnos** estis franca superrealisma poeto kiu ludis gravan rolon en la tiama movado Superrealismo. Li mortis en la nazia koncentrejo Theresienstadt. Li naskiĝis en Parizo la 4an de Julio 1900, kiel filo de viandovendisto ĉe la fama merkato Halles. Desnos studis en komercolernejo, kaj eklaboris kiel oficisto. Post tio li laboris kiel literatura kolumnisto por la ĵurnalo Paris-Soir. La unuaj poemoj de Desnos aperis printitaj en 1917 en La Tribune des Jeunes (junulara tribuno) kaj en 1919 en la gazeto de avangardo nome Le Trait d'union (streketo), kaj ankaŭ samjare en la Dadaista gazeto Littérature. En 1922 li publikigis sian unuan libron, nome kolekto de surrealistaj aforismoj, laŭ la titolo Rrose Sélavy (baze sur la nomo (pseŭdonimo) de la populara franca artisto Marcel Duchamp).

Kial oni parolas?

Ĉu vi jam cerbumis, kial oni parolas? Nun certe estas tiuj, kiuj diras: oni parolas por ke ni povu komuniki. Sed kial ni komunikas per nia buŝo? La surdmutuloj kapablas komprenigi sin ankaŭ permane. Eble ekzistus ankaŭ aliaj manieroj per kio ni povus ŝanĝi pensojn. Iam mi legis fantastan novelon, ke en la fora universo estis planedo, sur kiu la tieaj estaĵoj komunikis per koloroj.

Laŭ mi povus ekzisti ankaŭ aliaj ebloj. Ekzemple ni homoj eligus diversajn odorojn aŭ per la movigo de niaj okuloj dirus al nia kunulo niajn sentojn.

Interese, ankaŭ tiel ni estus komprenitaj, eĉ ni povus komuniki bonege.

Do, en la universo eble ne estas la unusola ilo la homa parolo. Sed tio estas certa, ke la raciaj estaĵoj ĉie komunikas per ŝanĝi pensojn.

verkis Apáti Kovács Béla el Hungario

Ne estus miraklo, se en iu tago ni devus ellerni ankaŭ ilian parolmanieron, aŭ krei helplingvon. Sed ĝis tiam ni klopodu disvastigi Esperanton, por ke tie ĉi sur Tero ni ne havu lingvajn malfacilaĵojn.



verkis **Apáti Kovács Béla** el Hungario

Trenis nin al Kasbaho per paŝoj malrapidaj.
Alĝerian fezon portis mia kunulo.
Donu al mi la plej brilan version de poemo
por ke mi rakontu kelkajn aferojn obskurajn.

La vojo supren tre alta kaj tre ŝtupa,
Antikva, plena je magazenoj kaj pafilbutikoj.
Malsupren vidiĝis la strando kun boatoj
kaj iu poligloto rapide alproksimiĝanta.

Nigraj virinoj ornamitaj per blankaj roboj,
Alĝeriinoj bruantaj kaj ridantaj
kaj maristoj el fremdaj landoj, portantaj
kaskojn strangajn kaj tropikajn vestaĵojn.

Malnovaj, senfenestraj, altaj domoj
kaj sidiĝantaj sur la ŝtonaj trotuaroj
maljunaj patroninoj, kvazaŭ el infero
ludis per kubo kaj tenis fumon el nargileoj. ²

En dormoĉambroj apartaj, malhelaj
sur larĝaj kaj malpuraj litoj,
blankaj kaj nigraj inoj, kun teruraj kaj senparolaj
okuloj
senhorizontaj kaj senĉielaj.

Ene de la numero "Talaat" ³ iu blanka
virina korpo sur tute nigra kuseno
ludas arte la tranĉilon en la mano
kaj legas dikan libron, malnovan.

Ŝi salutas min pere de araba bondeziro
kaj elparolas al mi kelkajn vortojn el ĉiu lingvo,
kiujn lernigis al ŝi en fremdaj aĉaj ejoj,
la kune kun ŝi kuŝiĝantaj maristoj.

Sed poste ŝi tenas la lipojn fermitaj.
Se vi restos - diris al mi - ne demandu mian nomon
Mi malamas senutilajn konfesojn
kaj la varmajn vortojn de viroj sed vantajn.

Ni restis kune senparolaj ĝis tagiĝo
kaj kiam mi pagis kaj foriri intencis
en la mano iomete la monerojn ŝi tintigis
kaj ilin forĵetis al mia vizaĝo kun kolero.

Kaj ŝi diris al mi: se vi vivis longe en la tropikoj
kaj se vi legis librojn strangajn,
kliniĝante sur la mapojn merkatorajn ⁴
vi nur lernis stiri malrapide la ŝipojn.

Sed la senmovan vojaĝon de
prostitutinoj,
kiu el vi, blinduloj, vidi povas;
La noktomeza suno ĉiam ĝin kovras
kaj ankaŭ la stelo de kelkaj senkonataj
de vi ĉielo.



Mi eliris. Ekster de ŝia pordo estis vico,
de atendantaj francoj, angloj kaj senegalanoj.
Sed ŝi enfermiĝinte ene ludis per la tranĉilo,
forĵetadante ĝin ĉifoje sur la muron.

Kaj mi sintrenis stumblante per malrapida paŝo,
de la malnova urbo de Alĝero ⁵ iris,
kun helpo de S-ro, ĝis kiam mi atingis
nian senkoloriĝantan grandan kargoŝipon.

poemo de **Nikos Kavvadias** el la greka literaturo
tradukis **Vasil Kadifeli** el Turkujo

¹ **kasbaho**: La nomo utilas ĉefe en la magrebaĵoj
ŝtatoj. Oni tiel nomas la fortikaĵojn aŭ historiajn
urbocentrojn. Ĉefe en Alĝero la nomo transiris al la
tuta malnova urbocentro, kiu iĝis parto de la Monda
heredaĵo de Unesko en 1992.

² **nargileo**: Orienta tabakpipo, konsistanta el ujo
plena de parfumita akvo, kiun la fumo trapasas antaŭ
ol alveni al la buŝo per longa fleksebla tubo.

³ **Talaat**: La poete ĉi tie parolas pri la pordonumero
3. En la alĝera lingvo la numero 3 estas elparolata
kiel: *tlata* - ثلاثة

⁴ **merkatora**: tipo de mapo desegnita laŭ la cilindra
projekcio metodo de la flandra kartografo Gerhard
Mercator.

⁵ **Alĝero**: Ĉefurbo de Alĝerio

* **Nikos Kavvadias** (1910-1975) estas moderna
poeto, verkisto kaj maristo profesie. Li uzis siajn
vojaĝojn tra la mondo, siajn vivon kaj adventurojn en
la maro, kiel potencajn metaforojn pri la eskapo de
ordinaraj homoj al ekster la limoj de realeco.



En la lernojaro 1959/60 mi vizitis sud-hungarian, provincan, medicinan universitaton. Somere de 1960, en julio mi devis partopreni „socian laboron” en iu vilaĝa agrikultura kooperativo, kaj fine de la unua monato de la someraj ferioj mi estis korpe anime sufiĉe laca. Mi serĉis „spiritan nutraĵon”, kiam mi – promenante sur la Malgranda Bulvarado de Budapeŝt – rimarkis en la montrofenestro de Librovendejo de la Pedagogoj maldikan Lernolibron de Esperanto, kies aŭtoro estis Julio Baghy.

Ĝis tiam mi sciis pri Esperanto nur la kutiman frazon, ke – „Ĝi estas ia artefarita lingvo.” La libreto estis tre malmultekosta, do mi riskis 14,- forintojn kaj aĉetis ĝin. (Mia monata stipendio estis tiutempe 700,- forintoj.) Veturante hejmen, jam en la trajno mi scivole tralegis la Antaŭparolon kaj la Gramatikan enkondukon. Tie min kaptis la melodio de Esperanto, kiam mi legis strofon el la fama poemo „Fine de septembro” de Sándor Petőfi, nia poeto-liberecbatalanto:

*Jen floras ankoraŭ la floroj en valo,
Jen verdas ankoraŭ la poploj ĉe l' font',
Sed vidu, jam tie la vintra vualo,
La neĝo ekkovris la supron de l' mont'.*

La unuan tagon mi ellernis la Enkondukan lecionon, la alfabeton kaj la fonemojn, la vokalojn kaj la konsonantojn, ilian prononcon, la akcenton kaj la bazajn regulojn de la ortografio.

La duan tagon mi pasigis per lernado de la unua leciono, la trian tagon per alproprigo de la dua leciono, kaj ĉiutage – dum 6-8 horoj – mi ellernis unu lecionon...

Ĝis la fino de aŭgusto mi trastudis la tutan lernolibron, kaj mi estus povinta paroli Esperanton mezgradnivele, se mi havintus esperantistan partneron. Neniu alia lingvo donis al mi tiel grandan sukcestravivaĵon, kian la lernado de Esperanto rezultigis. Bonhumore kaj feliĉe mi komencis la duan studjaron. Fiere mi rakontis al nia universitata, gvidanta lektoro pri fremdlingvoj mian someran, lingvistikan esperanto-aventuron.

Kiel malvarmega duŝo tuŝis min la opinio de la ŝatata kaj respektata sinjoro lektoro: - „Ludoviko, komprenu bone, ke Esperanto tute ne estas lingvo. Ĝi estas stultaĵo. Serioza homo ne okupiĝas pri Esperanto. Lernu anstataŭ Esperanto normalan lingvon, ekzemple la italan!...”

Tiel okazis, ke en la sekvantaj kvin jaroj mi tute ne okupiĝis plu pri la internacia lingvo Esperanto.

Do en la dua studjaro de la universitato – laŭ la propono de la sinjoro lektoro – mi komencis lerni la italan lingvon.

(Dum la unua studhorro mi surprizite konstatis, ke ĝuste la sinjoro lektoro instruas la italan lingvon. Tiu ĉi lingvo ŝajnis al mi tre facila: „La lingua italiana è molto facile per me.” Nek la sinjoro lektoro, nek miaj samgrupanoj volis kredi, ke antaŭe mi neniam lernis la italan lingvon. Ili pensis kaj diris, ke mi mensogas asertante, ke vere, mi neniam lernis ĝin. Nur nun, post jardekoj de senĉesa uzado de Esperanto mi malkovris, ke tiutempe mi spertis la kapabloevoluigan, „propedeŭtikan” efikon de Esperanto, la fakton, ke helpe de Esperanto oni povas facile alproprigi la metodikon de la lingvolernado.)

Dum la sekvintaj 5 jaroj la maldika lernolibro de Julio Baghy kuŝis ie sur mia librobreto. Mi provis uzi la germanan, anglan kaj rusan lingvojn dum miaj universitataj studoj, - sed mi ĉiam sentis la malkomfortan fakton, ke parolante kun denaska germano, anglo kaj ruso mi estas kaj eterne restos „duaranga lingvouzanto”, kiu neniam diras tion, kion volas, sed nur tion, kion povas.

Post mia duonjara soldata servo, en 1966 mi komencis mian kuracistan praktikon en la budapeŝta Hospitalo Ladislao por Infektaj Malsanoj, en la sekcio de ĉefkuracisto **D-ro Kolomano Kalocsay**. Mi estis deĵoranto iun posttagmezon, kiam la ambulancanoj enportis maljunulon en la sekcion. Sur la dokumentoj de la paciento mi ekvidis la nomon **Julio Baghy**.

De kie mi konas ĉi tiun nomon?

Post mallonga cerbumado mi malkovris, ke mi vidas la aŭtoron de la iama, maldika Esperanto-lernolibro...

Depost nia unua, persona renkontiĝo mi ofte vizitis la „Paĉjo”-n, Julion Baghy, ĉe lia hospitala lito. La maljuna, malsana, sufokiĝanta homo plibeliĝis, kiam li parolis pri Esperanto. Li rakontis la historion de sia vivo, la militkaptitecon en Siberio, la vojaĝojn dise en Eŭropo, kiam li ĉie instruis Esperanton. Li rakontis pri la poeto-amikeco kun Kolomano Kalocsay, pri la revuo Literatura Mondo, pri la universalaj kongresoj de Esperanto. Li donacis al mi la esperantlingvan Faraono-n de Bolesław Prus. La tri-voluman romanon mi baldaŭ tralegis kaj grandparte komprenis. Tio estis mia dua, granda sukcestravivaĵo kaŭzita de



Esperanto.

Jen, koncize la historio de mia „aventuro” kun Esperanto. Mi fariĝis la lasta disĉiplo de Julio Baghy, kiu transdonis al mi sian amon kaj entuziasmon rilate al Esperanto.

En marto de la jaro 1969 ni fondis kaj ekde tiu jaro ni funkciigas la Budapeŝtan Medicinan Esperanto-Fakgrupon.

Kaj fine de tiu ĉi historioto permesu al mi la kara Leganto tiri la plej gravan konkludon el mia „aventuro”.

Kiel 20-jara junulo mi senvorte kaj senkritike akceptis la opinion de la ŝatata kaj respektata universitata lektoro. Mi supermezure estimis la

aŭtoritaton. Dum la pasintaj preskaŭ kvin jardekoj mi ellernis la lecionon: ĉiu homo devas elformi sian pensmanieron kaj opinion. Ĉar estas ĉiam pli facile akcepti alies opinion, ol malrapide, malfacile, turmentiga kreio sian propran starpunkton.

„Se la devigan disciplinon anstataŭigus la memdisciplino, nur tio povus certigi la estonton de la homaro.” (Profesoro D-ro Owe Bruno Fahlke)

La 14-an de februaro, 2007

D-ro Lajos Molnár, prezidanto de la Budapeŝta Medicina Esperanto-Fakgrupo

Blogo de komputilvendisto

-- el la blaga blogo


Mia unua laboro kiel dungito estis en komputilvendejo en Barcelono. Tiutempe, fine de la okdekaj jaroj, la komputilaj ekranoj estis nigraj kaj la literoj verdaj. Ankoraŭ ekzistis nek musoj, nek grafikaj operaciumaj sistemoj, kaj kiam kliento aĉetis komputilon, tio estis ja grava okazaĵo. Ni kunportis la ĵus akiritan ilon al la hejmo aŭ al la oficejo de la kliento por instali ĝin kaj instrui la uzonton per duhora rapida kurso. Ni revis pri tio ke en la, onidire, evoluantaj landoj, homoj iros al vendejo, aĉetos sian komputilon, pagos kaj foriros sen pliaj komplikaĵoj. Kompreneble, neniu pensis tiam pri aĉetado per tutmonda reto, kiu ekzistis nur en la menso de kelkaj guroj.

Mi jam estis sufiĉe sperta vendisto, kiam la Biologia Universitato de mia urbo aĉetis novan komputilon. Laŭ nia tiama kutimo, mi kunportis la novan aĉetaĵon, instalis ĝin kaj instruis la sekretariinon funkciigi ĝin. La sekvan semajnon telefonvoko atentigis min, ke iu fuŝo okazis tie. Mi reiris al la universitato por klopodi solvi la problemon.

Fakte, mi havis nenian ideon pri komputila riparado, sed ofte temis pri kablo malbone konektita aŭ ne sufiĉe bona kono de la uzanto. Tamen, ĉi-okaze ne. La komputilo de la biologia universitato ŝajnis havi ion pli gravan: de tempo al tempo aperis strangaj literoj sur la ekrano kaj tuj poste ili malaperis kvazaŭ dancante sur la timige nigra fono. Mi estis diranta al la sekretariino, ke mi kunportos novan sendifektan komputilon, kiam aperis ŝia ĉefo.


Li aspektis tipe: distriĝema geniulo kun nekombitaj haroj kaj duonrompitaj okulvitroj, ĵus elirinta el la laboratorio. Kun serioza mieno li diris al mi: “ĉu vi ne opinias, ke povas temi pri viruso?”. Tiutempe, oni ankoraŭ tute ne parolis pri tiaj informadikaj virusoj, do vi povas imagi, ke tiu komento surprizis min, kvazaŭ li dirintus: “ĉu vi ne opinias, ke la komputilo deprimiĝis?”. Kiel viruso aŭ bakterio povus eniri

komputilon? mi pensis. Ba, tiuj sciencistoj loĝas inter mikroorganismoj kaj vidas ilin ĉie. Mi afable respondis, ke ne, ke tio tute ne eblas. Mi ridis dum semajno pro la freneza komento de la stulta geniulo, sed post kelkaj monatoj mi legis en faka revuo, ke tiuj komputilaj virusoj ja ekzistas kaj, kiel nuntempe ĉiuj scias, ili kapablas kaŭzi vere gravajn problemojn. Do finfine montriĝis, ke la stultulo estis nur mi, kiel kutime.



verkis **Viktoro SOLÉ**, Katalunio

Fonto: “La blaga blogo”, revuo **Kontakto**, #280, 2017:4, p.5



Saluton! Kiel vi fartas? Ne ĝenu, kara, mi petas vin! Ĉio al vi pasos bone! Vi estas forta virino. Mi scias tion.

- Jes, mi estas forta. Ne turmentiĝu, kara, pri mi! Mi estas preta akcepti malfacilaĵojn. Ne, mi ne timas la doloron. Vi bone scias, ke ĝi estas forgesebla.

L virino sopirĝemis, ordigis la kuŝeton por ke esti pli oportune en la lito kaj diris iom maltrankvile:

- Ĉu vi bone fartas? Ĉu jam saniĝis via kapo?

- Ho, jes! Mi sentas min bone, sed baldaŭ mi ekboniĝos...

El la telefono eksonis vira baritonvoĉo kun ete ironia noto kun kiu parolas Eva, tiel nomiĝas la kuŝanta virino en la hospitallito.

- Mi ĝojas pri via humoro, Moni. Tio signifas por mi, ke vi sentas vin bone, kara amiko. Sed mi pensas, ke vi devas konsulti kun doktoro ĉar via longa kapdoloro ne estas normala. Mi same pensas ke vi bezonas longan ripozon.

- Vi estas prava! Mi obeemas vin!

Post kelkaj sekundoj da silento el la telefono denove ekaŭdis la voĉo de Simeon:

- Ni devas fini nian parolon, ĉar iu sonas ĉe la pordo. Mi telefonos al vi morgaŭ, antaŭ operacio. Ĝis baldaŭ.

La telefono kavazaŭ ekklakis kaj la voĉo de la viro perdiĝis. En la hospitalĉambro estis ankoraŭ paciencinoj kaj ilin same oni devos operacii. Ŝi ne demandis virinojn kiaj estas iliaj problemoj. Ili venis tagmeze, sed ŝi ne havis deziron paroli kun malsanulinoj. La pensoj de Eva, post la parolo kun Moni, ek iris al la alia direkto.

Estis antaŭ kelkaj jaroj kiam ŝi renkontiĝis kun Simeon dum la konferenco. Ĝia temo estis pri la pretenco de la socio akcepti la "malsamajn" kaj ilian rajton manifesti libere siajn pensojn. En plenega salono estis brue kaj oni povus vidi multajn starantojn. La bruo eĉ malhelpis aŭskulti bone al la sidantoj en la lastaj vicoj. Li ne iris sur la tribuno, stariĝis kaj diris sian nomon. Ŝi rapide trovis la nomon en la programo kun la nomoj de la raportantoj, kiuj diskutos la temon.

"Docento Simeon Georgiev – biologo, administrato pri katedro "Biologio" en Medicina akademio Vieno, Aŭstrio."

Tio estis informo pri li en la programo. Ne estis precizita kies reprezentanto li estis aŭ Georgiev reprezentos sin mem.

Li estis alta viro, belstatura, blondharara, sed kun brunokuloj, longforma vizaĝo kaj helhaŭto sed brunigita de la suno. Estis ĉirkaŭ tridek kvin aŭ

kvardek jara viro. Li ekkomencis paroli en perfekta angla lingvo.

- *Mi estas biologo, sed mi nun ne parolos kiel scienca laboristo. Mi deziras paroli pri tiu ĉi problemo de alia vidpunkto. Mi havis fraton samseksamulo. Li jam iris en pli bonan universon.*



La bruo en la salono haltis kaj plej parolantaj ekrigardis al la eleganta viro, staranta en la mezo de la konferenca salono. La homoj sidantaj antaŭ li turniĝis por vidi lin.

- Venu al la scenejo! – la prezidanto invitis lin.

- *Dankon! Kaj de ĉi tie ili aŭdos min kiuj volas tion. Mi parolas alte!*

La salono iom ekbruiĝis, sed rapide revenis la silento.

- *Jes, li foriris de tiu ĉi mondo. Kaj li estis tre bona, bela kaj tre talenta. Mia frato ne povis travivi sian propran malsamecon. Mi deziras rakonti al vi lian historion, lian sorton. Ljuboslav estis lia nomo., sed ni nomis lin Ljubo. Li estis dekdu jaroj pli aĝa ol mi. Mi estis malgranda kiam mia frato iris por lerni en la grandan urbon. Li pentris tre bone, ne laŭ lia aĝo estis liaj pentraĵoj. Lia instruisto pri pentrarto diris, ke li havos brilan karieron se li daŭrigis sian studon en la Akademio. Mia patro estis skeptika, dubis kaj ne kredis tion, kaj ne dezirus por ke mia frato estu pentristo.*

"Neserioza laboro estas tiu ĉi pentrarto – diris mia patro - La profesio de la inĝeniero estas renomita." Li murmuris, sed laŭ la premo de mia patrino li konsentis. Ili registris lin. Mia frato estis tre feliĉa. De kie li heredis tiun ĉi kapablon, mi ne scias, sed ĉiam estis novaj bildoj sur la muroj de niaj ĉambroj. Komence li pentris sur la folioj de pentrobloketo per akvofarbetoj /akvarelo/ kaj poste per tuĉo kaj la lastaj tre similas al grafikaĵon. Ni, la infanoj de la ĉirkaŭaĵoj, ludis per pilko, piedbatis, saltis, eĉ faris korbos por trejni nin korbopilkon. Kaj li ankoraŭ pentris aŭ aŭskultis muzikon el la kasedoj kiujn li aĉetis per ŝparegaj de la matenmaĝoj stotinkoj*. Li ofte sidis sur la balkono pensante kaj iel malĝoja.

Proksime de nia domo, en la kvartiro vivis luanto. Li estis fotografisto. De kie li venis, kaj kiu li estas nenio scias. Ekloĝis en somerkonstruaĵo de la onklo Petro Donka, vidvino kaj seninfana. Ili kun onklo Petro

prenis de ilia parenco knabineton por kreskigi ĝin kaj poste ĝi - ilin. Sed Radka, tiel nomis la knabineto, frue maturiĝis kal frue edziniĝis. La edzo estis junulo el urbo kaj ne ekdeziris esti bofilo, ĉar li estis nur unu filo de siaj gepatroj. Kaj por desegni la feliĉon de Radka onklo Petar kaj onklino Donka ne aŭdacis. La amo de Radka kaj Plamen kortuŝis geonklojn. Kaj ili, la gejunuloj, vivis kun siaj gepatroj en la urbo, kie ili havis pli grandajn ŝancojn por solvi, por trovi taŭgan laboron.

Post kiam onklo Petro mortis, onklino Donka restis sola. Ŝi prenis luanton por ne esti soleca. La gejunuloj venis vidi ŝin de tempo al tempo, sed ili rapide revenis hejmen. Al ĉi tiu fotografo, Evtim estis lia nomo, la junaj knaboj kunvenis. Ankaŭ estis knabinoj sed malpli. La patrino ne permesis al ili, ili zorgeme pririgardis la knabinojn. Evtim estis ĉirkaŭ kvindekjara. Oni diris ke li estas maljunula fraŭlo. Li faris fotojn de homoj pri naskiĝtagoj, ferioj kaj funebroj por la memoro. Mia frato, jam studento, ofte iris tien, speciale en la somero kiam li revenis dum la ferioj kaj havis pli da tempo. Tiam li restis tutan tagon kun Evtim. Sed mia patro ne tre ŝatis ĉi tion amikecon. Li kverelis al mia frato kaj minacis, ke malpermesos al Ljubo, senokupe esti ĉe tiu "vagabondo", kiel nomis lin mia patro. Mia frato pravigis sin, ke la fotografo faris artverkojn tio estas nomita Fotografarto en la fotografo, kaj li estas instruisto pri pentrado pri kiu li studis. Mi preterlasis diri ke Evtim estis instruisto en loka baza lernejo. Tiel mia frato pravigis la kontaktojn, antaŭ paĉjo, kun li.

Pasis kelkaj jaroj de kiam Evtim ekloĝis en nia urbo, dum la somero la loĝantoj ekparolis ke li estas pederastulo, tiel la homoj nomis la malsamajn. De kie ili eksciis, mi ne scias, sed la reago de la homoj estis rapidega. La gepatroj de la infanoj, kiuj vizitis la fotiston, reagis plej akre. "Ĝi estas kontaĝa". "Li ankaŭ infektos niajn infanojn." "Tuj li foriru de la urbo". "Kiel eblas, ke tiu persono esti instruisto?" "Honto!". "Eksteren de la lernejo, eksteren de la urbo!"- tiuj vokoj estis aŭditaj. Ekzistis homoj, kiuj defendis lin, sed ili estis malmultaj kaj liaj argumentoj, ke ĝi ne estas kontaĝa malsano, sed genetike entreprenita problemo ne trankviligis la socion en nia malgranda urbo. Kaj mia patro estis la plej sovaĝa rilate al atakoj kontaraŭ Evtim. Li eĉ proponis organizi grupon, kiu devigas lian forpelson! Panjo provis trankviligi lin, sed tio faris lin pli ambicia.

Lun nokton granda skandalo eksplodis en nia hejmo kiam mia frato klopodis protekti la fotiston per argumento, ke tio ne okazas pro la deziro de la individuo sed estas fiksita de liaj genoj. Li eĉ klarigis

per ekzemplo, ke niaj najbaroj antaŭ jaroj havis kapron ambaŭsekseman. Ĉio tio estas biologio.

- Vi silentu! Kia biologio! Ekde la tempo de Adamo kaj Eva viro kaj virino estis kreitaj por ke ili daurigi la homaran genton, por ke estu homoj sur la tero. Ĉi tio estas peko! Kaj mi ne aŭdu vin parolantan tiel, protektantan lin kaj vi ne iru plu al Evtim. Degenerinto! "Fotografisto. Pentristo" - masko sub kiu li kaŝis. Ankoraŭ morgaŭ mi organizos grupon por forpeli lin de nia urbo! Ne parolu! Ĉu vi instruas min!

Ljubo, mia frato silentis, sed ŝajnis al mi, ke estis timigita. Mia patro ne organizis siajn sampensantojn la sekvan tagon ĉar ni eksciis, ke Evtim estis forkondukita ien dum la nokto. De ĉi tiu tago ŝanĝis mian fraton. Li estis fermita, ne kontaktis kun aliaj. Li pentris malmulte, sed liaj pentraĵoj estis malserenaj, eĉ mi dirus malbonsignaj. Mi klopodis paroli kun li. Sed Ljubo nur ŝvingis la manon, turnis la kapon kaj en liaj okuloj mi vidis larmojn. Nur unufoje li diris al mi. "Ankoraŭ ege juna vi estas por kompreni la tragedion de tiuj ĉi homoj, sed vi devas scii, ke nia patro ne estas prava! Memoru, mi petas, tion! Sed la temo pri homoseksualismo ofte ĉeestis hejme. Mia patro ne povis akcepti ke tiu viro estis instruisto, kiu havis kontaktojn kun la knaboj en la ĉirkaŭaĵo. Mia patrino silentis. Ŝi ne kontraŭdiris. Sed mia frato forlasis la ĉambron.

Ne pasis ankoraŭ dudek tagojn kiam iun vesperon mi aŭdis kverelon inter miaj gepatroj.

- Tio ne povas esti vero! - mia patro kriis.

- Jes, vere - mi aŭskultis mallaŭta voĉo de mia patrino.

- Vi mensogas min! Mi ne kredas vin!

- Mi diras al vi la veron!

- Kiu diris al vi?

- Ne necesas, ke iu diru al mi. Mi estas patrino, kaj mi sentas per koro kio estas vero, kio ne.

- Tiuj estas inaj stultaĵoj! - estis rapida respondo de mia paĉjo.

- Ne estas inaj stultaĵoj. Tio estas la vero, li dividis kun mi. Multe Ljubo ploris kaj timis pri si mem.

- Kio? Mia filo pederastulo? Vi frenezas!

- Bonvolu ne krii! La infanoj aŭdos vin!

- Kie li estas? Mi mortigos lin! Mi, lia patro, per siaj propraj manoj, mortigos lin! Mi sciis, ke ĉi tiu fotisto nur kaŭzas al ni problemojn! Mi trovos kaj likvidos lin!

- Bonvolu ne krii, mi petas vin! La infanoj aŭdos nin! Mi promesis ne diri al vi, sed... Vi devas scii!

Mia frato, kun kiu ni estis en la ĉambro, rapidstariĝis de la seĝo kaj rapidpaŝante iris al la pordo. Li fermis ĝin malantaŭ kaj mi aŭdis trafikpordon enfermigi.

Ljubo ne revenis ĉi nokte. Mia patro malpermesis al panjo serĉi lin. Li ne revenis sekvan tagon. Panjo ploris, kaj mia patro malbenis Evtim-on. Kiam la venontan tagon li ne venis, patrino iris al la milicio, por raporti lian malaperon.

Ili trovis lian korpon sur la rokoj. Li ĵetiĝis en la abismon, sed implikiĝis en iuj arbustoj kiuj tenis lin super la abismo. Kiom longe li estis tie? Ĉu jam li mortis aŭ ankoraŭ duonvivan, kaj ni ne kompemis?

Panjo malsaniĝis kaj forpasis frue. Mia patro iĝis drinkulo.

En la salono regis silentego. Nenia aplaŭdo estis aŭdita.

Jes, tiam mi konatiĝis kun Simeon kaj ĉi tio starigis komencon de nia longdaŭra sincera amikeco. Aligis nin la kaŭzo – toleremo kaj amo al la proksimulo! Sed sen defiladoj kaj paradoj de la malsamaj, sed komprenante la problemojn kaj klerigo!'

Eva fermis la okulojn kaj daŭris la fadeno de ŝiaj memoroj.

* **stotinko** : 1-100% ero de la bulgara levo

ROZO

verkis kaj sendis Ivaniĉka **Maĝarova** el Bulgario

Mia japana korespondanto

MIA JAPANA KORESPONDANTO – VASTALTO

H irotaka Masaaki (Vastalto) estas unu el miaj alilandaj korespondantoj de lastatempe. Mi trovis malmulton pri li en la reto tamen tiuj parolas pri lia modesteco. Fakte li atingis multon ekde 1968, kiam li komencis lerni Esperanton.



Li estas estrarano de la Japana Esperanto-Instituto.

Li estis redaktoro de la Esperanta versio de la monda blogo Global Voices (2013-2018).

Li estis unu el la redaktistoj en la skipo por la libro Poezia Antologio Nazim Hikmet Ran", 2016.



verkis kaj sendis Elena Popova, el Bulgario

Li verkis kaj eldonis la libron "Kiel verki hajkon en Esperanto". Ĉi tiu libro enhavas cent hajkojn de Vastalto

Nun li laboras en teamo, kiu kreas novan Japanan-Esperanton Vortaron.

Verŝajne la homoj, kiuj konas lin povus rakonti pli pri li, ol mi. Mi estas dankema al li pro lia helpo. Li donacis al mi, al nekonata virino, sian libron "Kiel verki hajkon en Esperanto" kaj delikate gvidis min dum miaj provoj verki hajkojn.

En sia libro per siaj hajkoj li, kiel instruisto, montras siajn sciojn. En ĝi estas gravaj konsiloj, kiel tiuj:

"Per hajko oni diru malmulte, sed imagigu multe."

"Bonaj hajkoj parolas malmulte, sed pensigas legantojn multe."

Mi lin demandis: "Kion donis al vi la Internacia Lingvo Esperanto? Ĉu vi estas kontenta?"

"Multon! Ĝi plivastigis mian mondokoncepton. Pere de Esperanto mi povis ekkoni, ke en la mondo troviĝas tre tre diversaj homoj kun malsamaj pensmanieroj kaj kulturoj. Sed malgraŭ malsameco ili ja amas Esperanton same kiel mi. Tio kuraĝigas min por daŭrigi mian aktivadon en Esperanto. Mi ja estas kontenta pri tio."

Mi prezentas lin al la legantoj de Turka Stelo kun kelke de liaj elegantaj hajkoj, por ke ni kune ĝuu ilin.



*Someraj nuboj...
Kvietaj okuloj de
blanka ĉevalo.*

*Kato hezitas
eliri ĉe la pordo.
Restas varmego.*

*Maldikaj lipoj
de dormanta infano –
lunarko klaras.*

*Dometo mia
kun herboĝardeneto –
akrido saltas.*

*Printempa pluvo –
amata melodio
en mi refrenas.*

*Knabo senmove
aventuron legadas –
verda ombrejo.*

*Kandela lumo
tenas domon en ordo –
tajfuno iras.*

Jen ankaŭ poemo de li:

Longe vivi estas...

En mia juneco...

Longe vivi estis multon vidi.

Longe vivi estis multon fari.

Longe vivi estis multon akiri.

Pasis jaroj...

Longe vivi ja estas multon vidi... multon malĝojan.

Longe vivi estas multon rezigni.

Longe vivi estas multon perdi.

Jes, mi trempiĝas en pesimismo ĉi-vespere.

Sed morgaŭ matene mi reakiros mian energion.

Nun mi ekdormu... Bonan nokton!

verkis kaj sendis **Elena Popova** el Bulgario

En la brikejo

Bruas la pintoj de l' graciaj pinoj kaj de l' verdaj belvestitaj betuloj, ĉar la vento hodiaŭ blovas supre kaj ne povas ŝanceli la tutan arbaron.

Por tio ĉi estas bezona ventego, ventego larĝa, por ke ĝi povu atingi la kampeton, ekskuigi ĉiun apartan betulon, ekbruegi en la krono de ĉia aparta pino. Tamen tio ĉi ordinare havas lokon dum finiĝanta aŭtuno, pluvema, petola, dum aŭtuno riĉa je malvarmaj kaj fortaj ventoj. Nun, somere, nek la bruna pineto tiel povas brui, nek la longaj branĉligetoj de betuloj povas ricevi la kareson de vento. La branĉoj, ornamitaj de malgrandaj folioj, mallevas sin direkte al la tero, kvazaŭ senmove, simile je radioj de disblovita ŝpinaĵo, aŭ je harligoj de koketema knabino... Ili mallevas sin longaj, maldikaj, helaj kaj ploras ĉiumatene juliajn rosojn, ĵetante sur la teron ombron kaj malvarmeton, tiom multe serĉatan de homoj dum la somero, precipe, se la somero estas tiel varmega, kiel ĝi estis hodiaŭ en la meztago.

Kaj ĝi efektive estis varmega.

En la mezo de l' kampeto, tie, malproksime, en la brikejo la homoj preskaŭ ne povis labori. Ili laciĝadis, malfacile spiradis kaj preskaŭ falis pro laciĝo. La suno verŝadis el la ĉielo efektivan fajron sur la teron.

La taglaboristoj per la manoj, malpurigitaj de argilo, viŝadis la ŝviton de siaj bruligitaj fruntoj, ili kovradis siajn brulumitajn kapojn per larĝaj pajlaj ĉapeloj aŭ per felto, malmoliĝinta sub la pluvo. Kelkaj laboristoj ombradis la ĉapelon, la kapon kaj la vizaĝon, bruniĝintan de la suno, per folioj kaj malgrandaj branĉetoj, por ke la varmego ne trarbuligu ilian cerbon, por ne malsaniĝi, ne fali, ne morti.

Tio ĉi estis terura!... La dudekoka milo de l' brikoj devis esti enmetata en la fornego kaj tio ĉi estis preskaŭ superhoma laboro.

La suno brulis hodiaŭ pli, ol ĉiam, eble tial, ke en la fornego jam la dua klafto da rezinaj lignegoj brulis sub la dekkvara milo da krudaj brikoj kaj la forno estis tiel varmega, ke ne permesis proksimiĝi al ĝi! Kvar feraj pordetoj, preskaŭ blankaj pro fajro, elĵetas malgrandetajn fajrerojn, kaj interne estas vera kratero, en kiu brulas maro da flamo, kvazaŭ en la infero.

La kurbinta laboristo ĉiumomente kaŝas en la poŝon sian mallongan pipeton, viŝas per sia kalikota ĉemizo la ŝviton de l' frunto, alĵetas en tiun ĉi inferon rezinajn lignegojn kaj per longa fera hoko movas la brulantajn pecegojn, vekante miliardojn da fajreroj kaj krakon de flamantaj lignegoj.

Kaj supre, tra la fendoj de l' fumita tegmento, la fumo estas puŝata kvazaŭ mallarĝaj riveretoj kaj elfluganta en la mondon, kiel densa, nigra nubego, malrapide ondanta pro la propra inercio kaj malforte levata de l' kratera varmego.

Postmorgaŭ la dua fornego estos jam preta por povi esti hejtata. Tri taglaboristoj tre akurate enmetas tien krudajn brikojn, konstruante por pli oportuna fajrigado malgrandajn krutajn koridorojn kaj fumtirtubojn, kaj kvar buboj kuradas tien kaj returnen sur tabuloj, kvazaŭ sur mallarĝaj vojetoj, kaj movas puŝveturilon, plenan da brikoj, ŝanceliĝante sub la pezo de la ŝarĝo.

La homoj parolas inter si nek unu vorton, ĉar ili ne havas pri kio paroli; ili kuras silente, ĉiu okupita de sia

laboro, kiu bolas, malkara laŭ sia takso, malfacila laŭ sia plenumo. La bruo de l' mondo ne alkuras tien ĉi, longaj mejloj da interspaco apartigas tiun ĉi ermitejon de la bruado kaj de la moviĝo de l' civilizacio. Senpense, en simpleco de l' animo, fizike mizerigita, la homo penegas tie ĉi kaj laboras l' argilon, ĉar morgaŭ li ree devas manĝi, ne atentante, ĉu tie, poste la brikejo, poste la montoj de l' novesurŝutita argilo, poste la betula arbaro, estas ankoraŭ ia mondo, kiu ankaŭ devas manĝi morgaŭ kaj kiu ankaŭ ne atentis la sorton de siaj proksimumoj en la brikejo.

Ankaŭ la majstroj de la brikejo, ili ankaŭ parolas nenion, kvankam ili pensas kiom da griza argilo ili povos elfari en la brikojn antaŭ la sunmalleviĝo, ĉar ĉia milo da ili alportas al ili preskaŭ "tri paperetojn" (1); tial ili rapidas, kvazaŭ tiu ĉi sekvonta milo signifas la finon de ilia laborego kaj kvazaŭ tiuj ĉi "tri paperetoj" malfermas la pordon al feliĉo kaj bonstato.

Ili veturigas kaj veturigas argilon el la kavernoj, bruetante per la krakantaj radetoj de la puŝveturiloj sur la tabuloj, kondukantaj ĝis la larĝaj tabloj, sur kiuj aliaj laboristoj, ĉiumomente trempante la manojn en siteloj kun malpura akvo, kunpremas l' argilon per la manplatoj ŝprucante ĝin ĉirkaŭe, kaj energie dislokante ĝin; poste ili enpremas l' argilon en kvarangulan formon, ebenigas ĝin per ebenilo kaj, kaptinte la krucigitan flankon de tiu ĉi sama ligna formo, ili lerte laŭ vico elĵetas ĝian enhavon sur ebenan plataĵon.

Kaj tio ĉi estas unu briko pli inter la miloj, el kiuj la mondo konstruas domojn, kaj palacojn.

Bruas la pintoj de l' graciaj pinoj kaj de l' belkreskaj betuloj. En la brikejo, malgraŭ tiu ĉi estas preskaŭ ne aŭdebla brueto. La suno jam foriras posten la arbaro, ĵetante siajn lastajn rozetajn radiojn. Antaŭ la dometo duonnudaj infanoj sidas sub la ombro de l' altokreskintaj loloj, kardoj kaj urtikoj; ili ludas pecetojn de seka argilo, kiujn ili ĵetadas senpense antaŭ si. Hundo kun flava palinta malpurigita lano enmetas tien sian nazon, kuŝas femure suben, kuntirinte sian korpon kaj dormetante, kaj de tempo al tempo rigardas per siaj sangruĝaj okulegoj la herbojn, la infanojn, la brikejon.

Sur la sojlo de l' dometo sidas virino, volvita de ĉifonaĵo, kaj per rompita tranĉilo senŝeligas por la vespermanĝo terpomojn, ĵetante ilin en la pladon kun akvo.

La dike teksita ĉemizo, kaviĝinta sur la enfleksita brusto, malkovras ŝian sekan sulkitan haŭton bruligitan de someraj varmegoj; la manikoj, rulitaj poste la kubuto, montras lacintajn manojn, sulkitajn de dikaj kaj sekaj vejnoj. Ŝia vizaĝo estas senpensa kaj tiel elturmentita pro zorgoj por ĉiutaga pano, ke nenia

medito kuraĝas reviviĝi en ŝia cerbo kaj montriĝi sur la vizaĝo por esprimi doloron aŭ kontenton.

Eĉ la amasoj de trabruligitaj brikoj, kuŝantaj kiel sanga makulo en la brikejo kaj atendantaj la plenumon de sia grava funkcio en la mondo, eĉ tiuj ĉi senvivaj amasoj verŝas en la homan animon pli da ĝojo, ol tiu figuro de la viva virino.

Per tiuj ĉi amasoj da briko la homoj levas konstruaĵojn, grandajn konstruaĵojn.

Tiu ĉi senviva figuro de l' virino estas ankaŭ angula briko en la konstruaĵo de familioj de la brikistoj. Ŝi senŝeligas terpomojn, ŝi muelas sur ŝtonoj sekalon, ŝi tranĉas per tondilego dikan tolon kaj per granda kudrilo kudras ĝin.

La malfacila vivo instruis ŝin je multaj ŝarĝoj, maldelikataj laboroj, je tiom multe, ke kelkaj el ŝiaj plifruaj delikataj deziroj kaj sentoj perdiĝis por ĉiam, kaj ŝi fariĝis tiel same kruda kaj maldelikata, kiel ŝia nuna vivo, kiel la elfosata argilo.

Ŝi ne zorgas, ke tiuj ĉi nudpiedaj malgranduloj, kurantaj sur la krutaj montoj de l' argilo, pro petolo, povas ruliĝi de ili kune kun pecoj de l' tero, kun la malsekaj trunkoj de l' kreskaĵoj kaj kun la restaĵoj de l' brikoj tien, malsupren, ĝis la bordo de la silenta, verdeta akvo, kie estas kaŝita la morto, tien, sur la fundon de l' nemezurebla profundaĵo; ŝi ne zorgas, ke inter la arbaraj kreskaĵoj inter la loloj, en la rubo de la brikejo ŝia infano eble iras per siaj nudaj piedetoj sur nestoj de kolubro kaj de viperoj; ŝi nu ne pensas laŭ kia vojo tiu ĉi infano iros poste tra la mondo kaj kie ĝi haltiĝos en tiu ĉi vojaĝo de l' plendorna vivo.

Ĉe la tombejo, en la tombo... diras ŝi.

Tie ĉi la homa vivo fluas nur laŭ tiu ĉi vojo de l' penso, ebene, senbrue, trankvile, kiel vento tra bruantaj pintoj de l' arbaro. Unu tago estas simila je la alia, kiel unu profundaĵo de argilaj kavernoj je la dua, kiel brikoj kaj tegmentbrikoj el unu sama formo kiel vestoĉifonoj, traigitaj de argilo, sur la dorsoj de taglaboristoj.

La infanoj, libere petolantaj ĉiutage, timas sole fremdulon kaj kiam ili vidas lin, ili kaŝas sin en la faldoj de l' malpura patrino jupo aŭ krie forkuras poste la gepatran dometon kaj malaperas tie inter florantaj papavoj en la ĝardeneto aŭ inter la loloj de l' intermontoj. lafoje ili elŝovas sin pli malsupren ĝis la laborita argilo, ili sidiĝas sur plenajn puŝveturilojn kaj, per la forto de l' imago transportiĝante en ian misteran mondon, fantazias veturi, kuraĝigante per krio la imagatajn ventpiedajn Pegasojn, kiujn ili rapidigas per branĉoj de filikoj aŭ per seka trunko de lapo (2). Aŭ ree ili provas levi la puŝveturilon kaj movi ĝin, sed la fortoj de l' malgrandaj manoj ankoraŭ unu fojo trompas ilin.

Tie ĉi, en la brikejo, estas aŭdata nur tia krio:

– La akcipitro forportis kokidon!

Aŭ ankaŭ alia voĉo, ripetata de ĉiuj:

– Lia moŝto sinjoro heredulo venis!

Tiam la infanoj, faletante sur la pecetojn de argilo kaj de brikoj, vundigantaj la nudajn piedojn per urtiko aŭ per pikiloj de kardo, forkuras en la intermontojn aŭ en la dometojn, kaj ploras, kiam ili falas dum la kurado.

La sinjoro heredulo tre malofte venas tien ĉi, ĉar li havas multnombro servantaron, kiu anstataŭas lin por tiu ĉi afero. Tamen la pejzaĝo de l' arbaro, la verdaĵo de l' betuloj, l' aromato de l' herboj kaj de arbaraj kreskaĵoj, la fantaziaj konturoj de l' intermontoj, prezentantaj originalan pentraĵon, faras la lokon agraba eĉ por la sinjoro heredulo kiu amas tie ĉi promenadi en eleganta malkovrita kaleŝo, tirata de altkreskaj blanke-grizaj ĉevaloj. Tiam la ĉefa brikisto kaj deko de aliaj laboristoj kun esprimo de timego kaj de senlima respekto malalte klinas siajn malkovritajn kapojn, preskaŭ tuŝante per la manoj la teron, sur kiu la piedoj de lia moŝto volis pro bonkoreco haltiĝi. Li mem iras tie ĉi rapide, demandas pri la nombro de l' elfaritaj brikoj, duonlaŭte kalkulas la enspezojn de l' brikejo, ekzamenas ĝian staton, tuŝetas per sia blanka fingro la malsekan argilon, prenas el la kradoj krudan brikon, sekiĝintan en la aero, pezas ĝin sur la mano, rimarkas la kvaroncolan etiĝon de ĝi post la trabluligo kaj, provas per sia pugna ekbato la sonoron de l' preta tegmentbriko.

Sed li faras tion ĉi tre rapide, pro manko de libera tempo. Dume la infanoj, poste la kreskaĵaj trunkoj de loloj, elŝovas sin malkuraĝe, kun ravo rigardante la brilan kaleŝon, kies odoro de gudro, de oleo kaj de l' ledogratable pikas ilian flaron. Ili rigardas per ravitaj okuloj la ĉevalojn, frapantajn la teron per la hufoj, la jungaĵon, sonantan per brilantaj radetoj, la livreon de l' veturigisto, la molajn kusenojn de la kaleŝo, la vipon... Precipe atente kaj dezirege la knaboj rigardas la vipon de l' veturigisto.

Ha, se oni povus havi tian vipon, nenion pli en la mondo! Tian vipon svingadi, ludante ĉevalojn! per tia vipo forhaltadi la rozkolorajn kapetojn de l' kardo! per tia vipo vergadi la abomenajn bufojn en la intermontoj! Per tia vipo eĉ ne estus ĉagrene ricevi vergadon sur la propran dorson, aŭ ekbaton sur la nudajn piedojn...

La vipo estas la idealo de l' infanoj el la brikejo, objekto de interparolado, de revoj. En la imago de la petoluloj el la brikejo, la vipo fariĝas io granda, potenca, universa, kiu profunde eniĝas iliajn animojn, efikas ilin tage kaj nokte kaj dum la sonĝado aperas al ili kvazaŭ aŭreolo, tiranta al si la infanojn, kiuj daŭre la dormado celegas al ĝi, perdas larmetojn, ekkrias kaj

vekiĝas.

La sekvantan tagon ili ligas al branĉo ŝnureton, aŭ ĉifonon el malnova jupo de iliaj patrinoj kaj batas per ĝi florojn, herbon, bufojn kaj papiliojn. Ho ve! tiu ĉi improvizita vipo ne forhakas, ne forpuŝas eĉ la penikojn de floretoj, sen paroli pri la plidikaj kapoj de kardo aŭ de lapo.

Kaj ĉe la vespermanĝo ili fine demandas la patron, humilaj kaj naivaj:

Patreto... ni volas vipon, tian vipon, per kia la veturigisto de lia moŝto batas la ĉevalojn... patreto... kaj la patreto malfacile spiras, duonfermas la okulojn, mallevas la kapon kun nigretaj pensoj sur lacintajn kaj malpurigitajn de argilo manojn poste turnas la okulojn al la edzino, levas iom la frunton kaj diras kvazaŭ al si mem:

Li estis... iradis, kaj kalkulis... kalkulis... Ĉien ĵetis la rigardojn... Poste li ensaltis en la kaleŝon, kaj forflugis, kiel vento, al la kampo.

Kaj la infano kun atentaj okuloj aŭskultas timeme, ne kuraĝante eĉ ekspiri per sia malgranda brusto.

Nur de tempo al tempo el la mallumaj anguloj de l' ĉambro flugas tra la aero mallaŭta malkuraĝa diro de l' infano:

– Estis la sinjoro heredulo.

Dume li tie, en sia palaco, ne alirebla por simplaj homoj, tute ne scias, ke tie ĉi, en la senbrua brikejo, li estas objekto de parolado de estimo kaj de revoj. Li ne scias, ke por la animo de infano de l' brikejo, li aperas kiel supertera, fantazia, grandega fortulo, kiel majesta kaj rava meteoro, kiel brilo por la malriĉa imago, kiel aŭreolo de beleco kaj de sorĉo.

Kaj la sorĉo, elflugante de lia granda persono, fluas inter la grizaj sonĝoj de l' homo, por kiu la brikejo estas la tuta universo, la bruo de l' arbaro – ĉiama muziko, la intermontoj – mirindaj vidaĵoj, la suno – la sola lumo kaj la varmeco, amata de tiu ĉi eterna aŭtuno de la brikeja vivo.

Ĉar kio alia tie ĉi povas esti? La taglaboristoj, jungitaj per la severa postulemece de l' sorto, al la puŝveturilo kun la argilo kaj la sinjoro heredulo, veturanta en kaleŝo sur molaj kusenoj – jen kio plenigas la tutan ĉi tiean vivon.

* * *

Pli malsupre, en la arbaro, estas altaj formikejoj kun moviĝanta amaso de laborantaj insektoj; en la intermontoj loĝas bufoj kaj ranoj, varmigataj de la suno post ilia franda manĝego, la sola okupo de amfibioj.

Tio ĉi estas tuta mondo, ĉie kaj ĉiam egala. Jen en la rampareto, konsistanta el malgrandaj trunketoj, el pikiloj de abio kaj el sekaj herboj, la vivo bolas ne pli malrapide, ol en la brikejo inter la homoj.

Ekstere de l' formikejo centoj da malgrandaj

laboristoj kuradas sur malrekta vojo, kvazaŭ sencele; sed estas sufiĉe observi unu formikon por vidi kiel ĝi kuradas sole sur unu sama spaceto sur kiu ĝi plenumas sian devon, forŝovante trunketojn kaj pajletojn, kolektante ilin en alian lokon bonigante ilian pozicion kaj daŭrigante pluen sian vojon, aŭ haltiĝante; ĝi movas siajn kornetojn, aŭ kurante devigas aliajn kuri laŭ la ĝusta vojo. Kaj tiel ĉiu plenumas harmonie sian devon, ne deirante de l' difina vojo, ne malhelpante unu al la alia.

Sed jen falas folio de betulo, alportita de la vento. La insektoj tuj kuras al ĝi, flaras ĝin, palpas per la kornetoj, iradas ĉirkaŭ ĝi. La folio falis ekster la formikejo kaj tial la insektoj ne tuŝas ĝin, kvazaŭ domaĝante la tempon por transporti la folion tra la limo de l' rampareto, kaj ĉiuj revenas al siaj okupoj. Sed se ia branĉeto barus l' eniron de la formikejo, la malhelpo tuj estus forigita per komunaj fortoj kaj laŭ bona ordo.

Kiam sciama homo mallevas sian vizaĝon pli proksimen al la formikejo, tiam la insektoj por unu momento haltiĝas, kvazaŭ enpenŝiĝe, sed baldaŭ sekvas plirapida kurado kaj normala movado. Tamen, se komencas gutadi pluvo, sur la ekstero de l' formikejoj la movado plifortiĝas kaj apud la enirejoj en la koridorojn oni povas rimarki tumulton. Nur tiam la formikoj malaltiĝas ĝis la homaj moroj; ili ne atendas laŭvican ordon, ne kaŝas sin unu post la alia, sed ĉiu, atentanta sian propran danĝeron, celas kaŝi sin pli frue ol aliaj.

Tamen estas formikoj, al kiuj la pluvo faras nenian impreson. Tiuj ĉi per larĝaj vojetoj kaj toneloj malproksimiĝas de la formikejo por kolektadi dolĉajn kreskaĵajn sukajn; fruktojn, aŭ restaĵojn da afizoj (3) aŭ l' afizojn mem, kiuj, portitaj en la malliberecon, estas kondukataj en la formikejon. La formiko, malproksime de sia domo kaptita de l' vento kaj rapide reĵetita sur la formikejon, staras kvazaŭ mirante, ke ĝi tiel subite revenis hejmen, ne plenuminte sian devon: ĝi ŝancelas la kornetojn, enpenŝiĝas kaj ree laŭ tia sama direkto, laŭ la antaŭa vojo kuras aŭ pelas siajn kolegojn. La tuta mondo post la formikejo, la mondo granda, vasta neniel interesas ilin. Ĉiu faras sian propran laboron, kun la sola celo subteni sian vivon, sian genton, sian formikejon.

Kiel en la brikejo... inter la homoj.

Tute alie vivas la bufoj kaj la ranoj. Glutante insektojn, sataj kaj multpezaj, ili sidas sur la bordo de postargilaj laĝetoj kaj ektimigitaj, saltas en la malfreŝan putran verdan akvon por post unu momento dismeti la postajn piedojn, reaperi tuj el sub la fluidaĵo, elmeti la kapon, enspiri la aeron kaj per freneza salto

aliĝi al la bordo, elrampi, kaj sidiĝi tie senmove, kvazaŭ malpurigita ŝtono. En la pli grandaj kaj ĉirkaŭlignitaj kavoj la bufoj kroĉas lignajn flankojn aŭ naĝantan duonputran pecon de arbo, aŭ sidante sur peceto de glita tabulo, naĝas kvazaŭ sur floso, movanta sur la supraĵo de l' akvo per malfortiĝanta inercio, kaŭzita de la eksalto de l' amfibioj. Iliaj streĉitaj okuloj, senmove kaj senpense direktitaj en unu punkton, ilia haŭto mirinde bela en siaj detaloj kaj abomena en la tuteco, ilia larĝa buŝego, de tempo al tempo avide malfermata, deturnigas observiston de tiu ĉi viva ekzistaĵo, kiu tamen ankaŭ havas rajton vivi tiel same kiel homoj, kies sola eksteraĵo ofendas nian estetikan senton.

La ĵetita peceto de argilo ne timigas ilin. Ili maldiligentaj, nenion farantaj, akceptas la baton pli malpli indiferente, iafaje nur movante la piedojn, aŭ renversiĝante malrapide flanken. Pli granda peceto de tero, ĵetita sur ilian korpon faras surdan resonon, kvazaŭ de ekbatita malplena haŭta tego; eĉ bato pli dolora elvokas nur mallaŭtan ĝemeton kaj tamen neniam movas de la oportuna loko la multpezan amfibion. Oni devas stariĝi antaŭ ili per sia tuta alta figuro, etendi al ili la bastonon, eĉ sen malbonaj intencoj, je kelka grado montrante koleron, kaj nur tiam la bufoj saltas en la akvon unu post la alia.

Kiel en la urboj... inter la homoj...

Bruas la pintoj de l' graciaj pinoj kaj de l' verdaj belevestitaj betuloj. La suno jam klinis post la arbaron sian helan kapon, en la arbitaro voĉas griloj kaj la botaŭroj (4); sur la herbejoj krakas raloj (5). En la malproksimo estas aŭdata brueto de l' babilanta muilejo, direktoj de kanoj kaj bruetoj de l' akvo en la riveretoj. El la marĉo elflugas surda ĝemo de ranoj, kaj la nokto malrapide volvas sian krepon ĉirkaŭ tiuj ĉi herboj kaj arbareto kaj la kanoj de l' rivero kaj la arĝenta malrekta rubando de l' fluida strio.

Super la horizonto jam ekpendis pala duonluno, la steloj unu post la alia komencas palpebri al la tero, super la herbo ondas malseka nebulo, kvazaŭ granda majesta baldakeno, sub kiu brilas la rosoj sur la herboj kaj flugas koraj sopiroj de homoj...

En la brikejo regas silento, kiel ankaŭ en la homa dormetanta animo, kaj en la pensojn eniĝas mirinda trankvileco...

verkis **Józef WAŚNIEWSKI** el Pollando

Aperis ĉe **Tümmel 1898, Pro Esperanto 1988**

Fonto: <http://esperanto.net/literaturo/noveloj/02.html>

>>>

En la malnova Vjetnamio, kutimo estis, ke la kandidatoj al universitataj konkursoj faru, antaŭ la tagoj de la ekzamenoj, oferadojn al la Genioj por petadi ties protekton.

Trang Quynh tute ne kredis je la Genioj. Sed liaj gepatroj ne volis, ke sia filo altiru sur sin la dian koleron kaj, ke kaŭze de tio, la vojo al honoroj estu fermita antaŭ li.

Trang Quynh faris do tion, kion rekomendis al li la gepatroj. Sed la mono, kiu estis donita al li por aĉeti la necesajon li jam tute elspezis por la manĝo. Kun malplenaj manoj li eniris iun templon, kie estis adorata Genio famkonata kiel tre potenca, genufleksis kaj faris jenan preĝon:

- Ho potenca Genio! Mi estas malriĉa kaj povas oferi nenion al vi nuntempe. Sed, se vi dignas etendi sur min vian protekton por ke mi sukcese trapasu miajn ekzamenojn, mi oferos al vi unu bovinon, honorparolo de Quynh!

Kaj li estis akceptita kiel Cong Sinh¹.

Rememorante tiam, ke li devis plenumi sian promeson al sia protektanta Genio, Trang Quynh iris prunti unu bovinon, kiun li kondukis kun ĝia ido al la templo.

Al la tablo, sur kiu sidis la idolo, li ŝnurligis la bovinon kaj lasis la bovidon tute libera. Poste, li adorkliniĝis antaŭ la altaro.

- Dankon, ho Genio, kiu per via efika protekto jam certigis al mi sukcesojn en la ekzamenoj! Jen la bovino kiun mi promesis oferi al vi. Akceptu ĝin, mi petas!

Tion dirinte, li retiriĝis kaj forkondukis la bovidon. Ekvidante sian idon foriri malproksimen, la bovino sin antaŭenĵetis por ĝin kuratingi kuntrenante la tablon, al kiu ĝi estis ligita. Ĉiuj kultobjektoj, inkluzive la statueton, rulfalis kun bruado.

- Kion? - ekkriis Trang Quynh sin turnante posten. Vi do kompatas mian povrecon, ho Dio de la Mizerikordo, kaj returne sendas al mi la oferaĵon, ĉu ne? Bone! Estu plenumata via volo!

Li remetis la tablon sur ties piedoj, restarigis la kultobjektojn kaj la statueton, malligis la bovinon kaj ĝin forkondukis.

Eltiraĵo el **Ridi Vjetname**, eldonita en 1981 de Fremdlingva Eldonejo.

Fonto: <http://www.kunlaboro.pro.br/esperanto/ridi-vjetname/la-dioj-trompitaj-de-trang-quynh/>

Notoj

¹ Universitata grado egala al tiu de licenciato..

Vortareto

* **bovo** - granda hejmbesto, kies ino liveras lakton, kaj virseksulo estas uzata kiel jungbruto.

* **ekzameno** - kontrolo de la scioj de kandidato.

* **kutimo** - tradicio, moro, rutino.

* **genio** - diaĵo, kiu zorgas pri la destino, bona aŭ malbona, de ĉiu homo.

* **promesi** - (iu) certigi, ke oni faros aŭ donos.

* **prunte** - kun la kondiĉo de redono post pli-malpli difinita tempo.

* **trompi** - (iu iun) intence erarigi por sia profito aŭ por nura malico.

* **universitato** - centro de supera instruado, dividita en fakoj (fakultatoj), kie oni instruas la diversajn branĉojn de la sciencoj kaj artoj, kaj kiuj aljuĝas titolojn (magistrecio, licencio, doktoreco).

>>>

(1) t.e. *paperan monon*.

(2) *Lappa major*

(3) *Aphis*

(4) *Botaurus*

(5) *Rallus*

Facilaj rakontoj

Ero el la libro „Kromozomoj“

Lorjak

Bernard Dubosk ne tre varme akceptis perspektivon iri ĉe la biologoj vekaj scivolojn. Sed ĉar tia iniciato jam estis plurfoje elvokita – ankaŭ ĉar evidente ĝi turmentus lian edzinon ĝis sia efektivigo – reankaŭ ĉar li sufiĉe konis ŝin por scii, ke ŝi ne ignoras ĝin antaŭ ĝia plenumo kaj senlace relevos la demandon, li mem aludis ĝin je sekvanta tago:

„Mirela! Ĉu vi ideas pri laboratorio, kiu povus kontentigi vin, realigi vian iniciaton?“

„Tute ne. Supozeble ĝi devus esti alte specialigita. Ni vidu en la adreslibro de la telefono...“

La nura konsulto de tiu jarlibro nenion povis alporti pozitivan. Nek pluraj telefonvokoj, ĉar la vokitoj rezignis pro nekompetento. Sed ĉiuj kondukis al tiu konsilo, ke la „paciento“ komence vizitu sian kuraciston, tial ke laboratoriajn esplorojn oni ne entreprenus sen ties preskribo. Konsilo, kiun Mirela logike subtenis:

„Evidente! Tiom pli, ke ni nenion komprenus el la rezultoj sen klarigaj komentoj.“

Sekve de tio, Bernard rendenvuis kun sia kuracisto, Dr. Menoret, al kiu li sukcesis prezenti sian demandon sen malkaŝo de la familia sekreto. Li eĉ kapablis ludi subtilan komedion de medicina scivolemo:

„Kara doktoro, vi certe miros pro la motivo de mia vizito. Eble vi mokos min. Aŭ opinios, ke mi perdigos vian tempon. Sed mi konfesas, ke sub la lavango de sciencaj komunikoj, kiujn distribuas la gazetoj, ankaŭ fronte al la konstanta progreso de la homaj scioj, kiujn ili spegulas, mi sentas min ĝisrande plena de meminstruaj demandoj.“

Li haltis por kontroli el ties vizaĝo, ĉu tiuj antaŭparoloj ne blokos la servemon de la doktoro, kiu havas pli urĝajn okupojn ol komplezi la sciencajn alsopirojn de vizitantoj. Tamen, ĉar la okuloj de la kuracisto esprimis pli da surprizo ol da malfavoro, li kuraĝis daŭrigi:

„Jes. Kiel preskaŭ ĉioma homaro, min turmentas demandoj: Kio estas mi? – De kie mi venas? – Kien mi iras? – Pli flanke: kia povas esti la fonto de miaj profundaj inklinoj?“

Bernard hezitetis. Kaj:

„Mi aŭdis en radio prelegon pri kromozomoj. De tiam mi perpleksas, ĉu tie ne kuŝas la respondo al miaj demandoj?“

Abrupte frontita, la doktoro eligis tuseton:

„Vi iom embarasas min. Pri la kromozomoj miaj

sendis Jindřiška Drahotová, el Ĉeĥio

umoj ne tre fortas. Mi ne multe scias pri tiu temo; miaj scioj ne estas pli vastaj ol viaj. Ja miaj ĉiutagaj taskoj centfoje pli ofte konsistas el la detekto de pulmaj rasloj kaj maj observoj el la efiko-komparo de siropoj kontraŭ la tuso, ol el studoj pri nukleoproteinoj. Mi ne estas biologo.“

Li denove silentis. Medite ekzamenis sian klienton, antaŭ ol sugesti:

„Se vi nepre deziras pliprofundi la demandon, jen kion mi proponas al vi. Mi faros al vi sangoprenon kaj tiun specimenon sendos al specialistoj por analizo. Ni kune studos iliajn konkludojn.“

Tiu propono plene respondis al la neesprimita espero de Bernard Dubosk. En formo de muta konsento li demetis sian jakon, relevis manikon kaj prezentis sian nudan antaŭbrakon al la nadlo de la malinjektilo.

Libro estas tradukita al la ĉeĥa de **J.Drahotová**



Solvo de la krucvort-enigmo

J	O	N	I	O
O	D	O	R	I
L	A	T	I	N
I	Z	O	L	E
S	U	P	E	R



N	O	V	A	N
A	N		M	O
J	A	R	O	N
O	M	A	R	O
Ĝ	E	M	O	J